esperanto

januaro 1990
83-a jaro • n-ro 1009 (1)
ISSN 0014-0635



- **1-a Azia Konferenco pri la Instruado de Esperanto**
- **Kun la Konstanta Kongresa Sekretario en Havano**
- ***Fokuso*: populara scienco je alta nivelo**

Por plia jardeko en Afriko

Enhavo

1 Novjara saluto de la Prezidanto de UEA: Novaj ŝancoj, nova inspiro (John Wells)
Kvardeko da landoj bezonas vian helpon
2 Regiona agado: Por plia jardeko da Esperanto en Afriko (Hans Bakker)
4 Landa agado: La Brazilo de afrika Esperantujo (Philippe Chavignon)
5 Vojaĝimpresoj: Ĉu iam reveni? Jes! (Sally Phillips)
6 Internacia Alfabetiga Jaro 1990: Kunlabori por la sama celo (Mark Fettes)
7 Instruado: La ĉina movado troviĝas ĉe vojkruciĝo (Edward Symoens)
8 Esplorvojaĝo tra Azio: La movado plifortiĝas rande de Pacifiko (Joachim Werdin)
9 Intervjuo kun Xue Meixian: Se la Estraro faros proponon, ĉinoj diligente plenumos ĝin
10 Motivado: "Kaj post la kurso, kion?" (Joachim Werdin)
Radio: Nova ŝanco por vastigi la informadon (Andrzej Pettyn)
11 Informado 1: Difini nian merkaton (Ivo Durwael)
Strategio: Investi por nia estonteco (Jean-Louis Texier)
12 75-a Universala Kongreso: Bonegaj kontaktoj kun la kuba socio (Nicola Rašić); Al Havano per radio!
14 Recenzoj: *La granda Meaulnes* de Alain Fournier (Viktor Sapoĵnikov); *Rande de l' prudento* de Miroslav Krleĵa (Karolo Piĉ); *Obsedita de l' suno* de István Gáll (Arnoldo Aguila); *Resonoj/Nachklänge* de Hubert Weinzierl (William Auld); *Ĵana d'Arko ĉe la ŝtiparo* de Paul Claudel, kaj *La mortinta reĝino* de Henri de Montherlant (G. Lagrange); *Fokuso*, jarkolekto 1988, red. András Lukács (Rob Keetlaer)
17 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
18 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
20 Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis julio 1990)

Vi trovos,

sub alia vesto, ankaŭ ĉiam pli alispecan enhavon en ĉi tiu revuo. Per tio mi ne celas, ke la redakta politiko ŝanĝiĝos kun la kovrilo kaj enpaĝigo. Male. De tri jaroj la revuo enlasas la freŝan venton de pli diversaj opinioj, pli disaj temoj kaj regionoj. Nun ankaŭ la paĝoj ricevas pli da aero. Al tio ni kompreneble oferis iom da materialo. Ĝin, kaj multe pli, vi rericevos per kelke da suplementoj tra la jaro, kiuj kune provizos vin per 12-a numero. Kontraŭ la sama kotizo, jen iom pli da monda oksigeno en via hejmo.

Kaj la enhavo? Kiel vi trovos ĉi-numere, la tutmondiga vento alblovas novajn ŝancojn kaj novajn problemojn. Ĉi tiu revuo iĝas ilia ĉefa diskutejo. Ankoraŭ ne alia estas la fakto, ke diskutas tie precipe eŭropanoj. Sed ankaŭ tio ŝanĝiĝos. Vi mem povus helpi, donacante abonon al triamonda amiko. Kaj ankaŭ pli proksime ni bezonas vian kunlaboron. Diru al viaj konatoj, ke estas pli da aero sur niaj paĝoj. Invitu ilin kuniri kaj kunspiri. Ni bezonas unu la alian: ĉar ju pli da flugiloj, des pli facila la vento...

La kovrilo: Elementa lernejo en Etiopio bildigas la alfabetigajn strebojn de Unesko, kiuj paralelas la niajn: vd. p. 6-7. (Foto: Unesko/D. Roger)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: Mark Fettes.
Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.
Telefakso: +3110 436 17 51.
Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).
Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.
Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 380 7408.
Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.
Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.
Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.
Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.
Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.
Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 12999, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.
Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51.
Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.
Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr 1009 (1), januari 1990. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Novjara saluto de la Prezidanto de UEA:

Novaj ŝancoj, nova inspiro

Kun la nova jaro 1990 ni eniras ankaŭ novan jardekon. Kiujn novajn eblecojn prezentos la 90-aj jaroj al la tutmonda Esperanto-movado, kaj al UEA specife?

En Brajtono UEA elektis novan Estraron – efektive multe pli novan, ol kutime en la lastaj jaroj. Se tio povus doni la impreson de granda renverso, valoras emfazi, ke tiel tute ne estis. Miaj rilatoj kun mia antaŭulo Humphrey Tonkin estas bonegaj, same kun la tuta antaŭa Estraro. Kaj la diversaj novaj estraranoj, kvankam en la komenco pluraj apenaŭ konis unu la alian, jam bone kaj harmonie kunlaboras.

Mi forte esperas, ke tiu harmonio karakterizos en la nova jardeko ankaŭ la tutan Asocion kaj la tutan movadon. Kiel estrarano en la periodo 1971-74 (por multaj el niaj membroj jam parto preskaŭ de la fora historio de la movado!), mi ankoraŭ nun forte bedaŭras la malnoblajn atakojn kaj kalumniojn, kiuj tiam tumultis ĉie tra la movado, interalie kontraŭ la persono de prof. Ivo Lapenna. Mi mem ne partoprenis en ili. De tiam mi estas konvinkita, ke ni devas strebi antaŭ ĉio al harmonia kaj paca kunlaborado interne de la movado, kiel antaŭkondiĉo por nia celado disvastigi la scion kaj utiligadon de Esperanto kaj tiel kontribui al la edukado por internacia interkompreniĝo. Nun, kiel prezidanto, mi faros ĉion eblan por certigi, ke tiel estos.

Kaj la novaj eblecoj antaŭ ni? Dum la lastaj monatoj ŝanĝiĝis la tuta politika aspekto de orienta Eŭropo. Unu landon post alia inundis ondo da ŝanĝo kaj liberiĝo; kaj tio havas grandan signifon ankaŭ por la Esperanto-movado. Nun la germanoj de ambaŭ ŝtatoj povas vojaĝi libere en la alian ŝtaton. Same la aŭstroj kaj la ĉeĥoslovakoj. Preskaŭ ĉie en Eŭropo ne plu ekzistas la grandaj baroj al libera esprimado kaj libera organiziĝado, kiuj pli frue bremsis la komunikadon. Oni povas esperi, ke en la estonteco malaperos ankaŭ la financaj kaj transpagaj baroj inter la "soclandoj" kaj la cetera mondo.

Se la renaskiĝinta orienta Eŭropo povos alporti al UEA inspiron de freŝa kaj nova idealismo, kaj se UEA scios profiti de la novaj kondiĉoj, tio aŭguros brile por la evoluo de Esperanto en la nova jardeko. Kaj same brilan evoluon aŭguras granda parto de tiu ĉi numero de la revuo, dediĉite al la landoj de Afriko kaj Azio. La eventoj de Eŭropo ne kaŭzu, ke la eŭropanoj forgesu pri la cetera mondo! Ankaŭ la venonta Universala Kongreso en Kubo helpos montri la kreskantan tutmondecon de Esperanto.

Saluton al la naŭdekaj! Feliĉon kaj vervon en la nova jaro deziras al vi ĉiuj

John Wells

Kvardeko da landoj bezonas vian helpon

La komenco de nova jaro estas taŭga okazo por ĵeti eble novan lumon sur la staton de la membraro de UEA.

La individua membraro en 1989 superis la rekordon de la Jubilea Jaro. Tamen ne multe: iom pli ol 7300 unuopuloj en 103 landoj trovis emon kaj rimedojn por tia subteno. Fakte malpli. Niaj pagipovaj membroj ofte forgesas, kiom malfacile estas por homoj en aliaj landoj pagi sian kotizon. 450 el niaj membroj en 1989 membriĝis per Fondaĵo Canuto. En 18 landoj temas pri la tuta membraro tie, inkluzive de elstaraj movadoj kiel la Togolanda kaj la Zairia. En 20 pliaj, nur kelkaj esceptaj individuoj povas pagi por si mem; tio validas interalie por Kubo, la lando de la venonta Universala Kongreso, kaj por la baraktanta movado de Rumanio.

La jara donaco de centoj da kotizoj al tiuj landoj nekalkuleble riĉigas la mondan Esperanto-movadon. Jes, riĉigas. La homa solidareco kaj movada signifo de tiu agado pli ol kompensas la elspezojn. Sed la elspezoj tamen ekzistas. Kaj ilin ebligas precipe la membriĝo de homoj el la pli riĉaj partoj de la mondo.

Interalie pro tio UEA lanĉis sian membrokampanjon. Ni celas atingi membraron de dek mil post tri jaroj. Por 1990 tio signifas aldoni plian milon al tiuj 7300 el 1989. Ni fidas, ke per komuna strebo tio eblas: la novaj membroj samtempe profitas el sia ligiĝo kun la monda movado, kaj ebligas al aliaj ĝui la saman kontakton. Sed ni bezonas homojn por pludoni la mesaĝon. Petu do stokon da varbiloj de la Centra Oficejo. La varbilo "DUE" prezentas la servojn kaj agadon de UEA, dum nova TEJO-varbilo faras same pri nia junulara sekcio. Distribuante ilin, vi kontribuos al la celo de ni ĉiuj: al la definitiva tutmondigo de Esperanto.

Regiona agado:

Por plia jardeko da Esperanto en Afriko

DE HANS BAKKER

Dum la jaro 1988-1989 UEA kompilis "Strategian Planon". Hazarde tio koincidis kun la (preskaŭ) dekjareco de la agado "Esperanto en Afriko". Tiuj dek jaroj permesis kolekti spertojn kaj fari konkludojn, por aldoni ĉapitron "Afriko" al tiu strategia plano.

Kelkaj bazaj problemoj

La situacio en Afriko ne garantias jam "plian jardekon da Esperanto" tie. Ni ĉiuj memoras promesplenajn evoluojn en tiu aŭ alia mondoparto, dum tiu aŭ alia epoko. Eĉ en Afriko ekzistis tiaj "oazoj" jam pli frue; plurfoje, plurloke okazis verdaj periodoj. Prosperis la kursoj, fondiĝis kluboj kaj eĉ landaj asocioj. En la Jarlibro aperis delegitoj en Afriko. Sed poste tamen la dezerto revenis kaj kovris la oazojn, ne lasante spuron de ili.

Tiu nestabileco ankoraŭ minacas nin, ĉar la afrika movado ne estas jam memstara. Ĝi dependas de siaj helpantoj: de UEA, de SAT, de IEI, kaj de centoj da aliaj asocioj, kluboj kaj unuopuloj. "Dependeco" signifas: monhelpo, sed ankaŭ konsilado, servoj, instruado ktp. Se ekzemple la japana esperantistaro konsultus la eŭropajn esperantistojn pri evoluigo de la japana movado, tio aspektus al ni stranga. Pri tio la japanoj mem kompetentas. Simile en Afriko devas kreski memstareco, sperto, kuraĝo, memfido, kompetento. Tion ni povas stimuli transdonante respondecojn kaj taskojn.

Tamen, ekzistas evidenta malsimilaĵo inter ekz. Japanujo kaj Afriko. Japanoj povas kotizi. Afrikaj esperantistoj ne povas pagi sian propran movadon. La mondekonomio moviĝas eĉ en ĉiam pli malbonan direkton: pligrandiĝas la diferenco. Tial plu necesos dum jardekoj solidareca helpo al malriĉaj esperantistoj. Kaj aliflanke: kiel afrikaj esperantistoj uzu tiun monon? Pliaj tiklaj punktoj: kiu decidos pri la disdonado de la mono, kiu kontrolos la uzon, kaj kiom tio konfliktos kun la dezirata memstarigo, menciita iom pli supre?

Sufiĉu jam tiuj ĉi kelkaj problemoj pri la estonta evoluo de Esperanto en Afriko. Mi ne volas arogi, ke nur mi scias la respondojn. Sed se neniu tuŝas ilin, ja *iu* devas komenci. Mi tial dissendis leteron al kelkaj plej koncernataj afrikaj aktivuloj. Estas ja *kaj* ilia *kaj* nia afero. Venis pluraj reagoj. Venu ankaŭ reagoj el la eksterafrika movado, i.a. el la gvidaj organoj de UEA. Al tio invitas ĉi tiu artikolo.

Afriko aŭ tria mondo?

Ĉu ni parolu nur pri Afriko? Estas facile mencii aliajn mondopartojn, kiuj estas en simila situacio. Tamen mi preferas trakti ĉiun situacion aparte. "La tria mondo" havas nur unu komunaĵon: sian dependecon de la riĉa mondo, sian malpotencecon. Sed la diversaj landoj cetere tre malsimilas inter si. Tiom kiom necesas pensado pri afrikaj landoj, tiom ĝi ankaŭ necesas por aliaj landoj, en aliaj kontinentoj. Sed ne ĉio en unu artikolo. La diferencoj estas tro grandaj.

Kio estas "Esperanta agado"?

El kio konsistas "Esperanta agado" en Afriko kaj aliloke? Utila klasifiko entenas jenajn tri ŝtupojn:

- *Varbado:* informi pri Esperanto, varbi komencantajn lernantojn.
- *Instruado:* instrui al komencantoj kaj poste al progresintoj.
- *Utiligado:* helpi al finlernintoj kiel uzi la lingvon.

Kutime la movado en Eŭropo donas multan atenton al "varbado": kiel interesigi la publikon pri Esperanto. Male, al la utiligado oni apenaŭ donas atenton. Oni supozas ke finlerninto mem trovas sian vojon en Esperantujo, malkovras ĝian utilon kaj ĝian ideologian valoron. Mi dubas pri la praveco de tiu agmaniero. La malforto de Esperanto ĝuste venas el tio, ke ĝia utilo ne estas evidenta, nek al finlerninto, nek al varboto, nek eĉ al ni mem. Pruvo de tio estas la programoj de niaj Esperanto-kluboj en multaj lokoj. La klubo kutime ne estas zumanta Esperantujeto, kien oni volonte kuras en libera momento, kaj kiu inspiras por vivi en internacia etoso. Ofte la ĉefa agado de esperantistoj estas: varbi kaj instrui denove aliajn. Tiel oni efike evitas la demandon: *kial*, pro kio entute oni varbas kaj instruas? Se la respondo al tio lasta estus pli klara, ankaŭ la varbado estus pli facila, ĉar pravigata de evidentaj valoroj de la lingvouzo.

Se mi dubas pri tio ĉi en Eŭropo, des pli mi emfazas mian opinion se temas pri Afriko. Varbado, informado, propagandado, publikaj prelegoj ktp estas *ne* necesaj. Ili eĉ estas danĝeraj. Mi klarigos tion poste.

Male, instruado estas grava, kaj utiligado eĉ gravega.

Utiligado

Por afrikanoj preskaŭ la sola maniero uzi Esperanton estas perkorespondo. La malriĉo kaj la grandaj distancoj malebligas vojaĝojn al kongresoj, aĉetojn de libroj, revuoj kaj kasedoj, kaj ĉion alian kio kostas monon, ĝis inkluzive aŭtobusbileton al alia kvartalo de la urbo por partopreni klubvesperon. Kun iom da elspezoj tamen, afrika esperantisto povas sendi leterojn al eksterlando, kaj partopreni lokan klubon. Jen la du ĉefaj utiligoj en Afriko. Ambaŭ havas sian plaĉon kaj utilon, altiron kaj valoron.

Ni fosu iom pli: por kio utilas korespondado? La respondo estas: unue, por sperti internacian amikecon kaj due, por interŝanĝi praktikajn servojn. La Esperanto-movado (same kiel aliaj fratecaj movadoj) donas etoson, kiu ne ekzistas en la kruda kaj kruela "ekstera mondo". Pri la dua utilo de internacia korespondado, la praktikaj servoj, estus citeblaj multaj ekzemploj, se tiu ĉi artikolo ne devus esti konciza.

Por kio utilas kluba vivo? En klubejo (kun biblioteketo, radioricevilo, kasedaparato) oni diskutas, kunsidas, planas, legas librojn kaj revuojn, studas, aŭskultas radioprogramojn kaj kasedojn, amuziĝas, dancas, trinkas, kantas, instruas, prelegas ktp. Tie homoj havas senton de komuneco. Tie oni sentas sin hejme. Tie oni agas en internacia mondo.

Kiun rolon havas ni, eksterafrikanoj en tiu "utiligado"? Por *internacia korespondado* necesas eksterafrikaj korespondantoj, kaj iom da mono (por la poŝtmarkoj). Por *kluba vivo* necesas iom da mono (por la biblioteko kaj aliaj kostoj).

Jam de multaj jaroj (de 1982) mi propagandas la koncepton de "*ĝemelaj rilatoj*", kiu signifas: korespondaj rilatoj en pli varia kaj intensa formo ol kutime. Tiaj ĝemelaj rilatoj vere eluzas ĉiujn eblojn de interesa, sincera, utila

interrilatado. Per ili oni fariĝas amikoj, kaj reciproke riĉigas la vivon. "La ŝlosilo de la agado en Afriko kuŝas ekster ĝi."

Varbado; misesperoj

Mi saltas al la *varbado*. Ĝi estas facila en Afriko, ĉar ĉio el la malproksima riĉa mondo ŝajnas koninda, havinda. Prelego facile altiras centon da aŭskultantoj. Transdonado de informo de unu persono al alia kaŭzas amason da informpetaj leteroj al UEA. Tiu interesiĝo grandparte fontas el miskompreno pri Esperanto. Oni imagas ke ĝi estas, same kiel religioj aŭ universitatoj, io kio alportas stipendiojn, laborpostenojn, radio-aparatojn aŭ brakhorloĝojn. La katastrofa senlaboreco en Afriko puŝas la pli energiajn homojn al ekstremaj klopodoj trovi eliron, trovi vojon supren, trovi perspektivon en la vivo – kio estas draste malsimila al la stereotipo de la "letargia almozulo".

Bedaŭrinde Esperanto ne donas stipendiojn nek brakhorloĝojn. Tion ni devas emfazi kaj emfazi denove. Senbrida malfermado de kursoj por komencantoj estus malŝparo de mono kaj laboro, ĉar la plimulto fine malkovrus la neeblon ricevi materiajn avantaĝojn kaj sentus sin trompita. Tial necesas bremsi la aliĝemon, kaj informadi insiste kial oni *ne* lernu Esperanton.

Instruado

Estas plia motivo por ke oni *ne* lernu Esperanton. La spertaj esperantistoj, do tiuj kiuj malkovris kaj praktikas la utiligadon de Esperanto, formas la veran movadon. Ilia agado tamen konsumas monon kaj laboron el la eksterafrika movado. Tiu havas limojn. La movado en Afriko ne povas kreski, simple ĉar la buĝeto de UEA ne povas kreski. La movado en Afriko estas plena. La lokoj, almenaŭ la subvencieblaj lokoj, estas okupitaj. Ni ne varbu pliajn adeptojn, ĉar ni ne povas provizi ilin kaj iliajn novajn klubojn.

Tio havas konsekvencojn por la instruado. Ne estu novaj kursoj por komencantoj, sed nur por progresintoj. Tio estas des pli necesa, ĉar estas granda bezono ne pri *pli da* esperantistoj, sed pri *pli bonaj* esperantistoj. La instruado perkoresponda, per la fremdlingvoj franca kaj angla, estas nek facila nek efika. Se iuj afrikanoj sukcesis brile ekregi la lingvon, tio okazis ne pro sed malpro (malgraŭ) la instrumetodo. La lingvonivelo ĝenerale estas malalta, kaj necesas grandaj klopodoj por plialtigi ĝin. Ofte instruisto devas pene mallernigi fuŝesperanton, kio estas pli malfacila ol instrui korektan lingvaĵon. Instrui al progresintoj estas malfacila ankaŭ pro la malabundo de vere bonaj instruistoj. Esperanto ne estas tiel facila! Kaj bonaj esperantistoj ne ĉiam disponas pri pacienco, tempo, talento klarigi gramatikon, kaj legebla skribmaniero...

*"Senbrida malfermado de kursoj por komencantoj estus malŝparo de mono kaj laboro... Estas granda bezono ne pri **pli da** esperantistoj sed pri **pli bonaj** esperantistoj."*

Konklude: plej gravaj estas seminarioj por afrikaj instrukapabluloj, kaj sendado de instruspertuloj al Afriko.

Se vi sekvis ĝis ĉi tie...

vi nun scias, kion bezonas la esperantistoj en Afriko. Ni pritraktis la tri terenojn de agado: varbado, instruado, utiligado, kaj ĉe ĉiu el ili ni konstatis kiel eksterafrikaj esperantistoj devas helpi.

Pri iaj helpoj ni parolu ankoraŭ pli. Ekzemple: pri mono.

La buĝeto de UEA ĝis nun brave eltenis la atencojn. Donacoj al la fondaĵo Afriko alvenadas, jam de dek jaroj. Vere, ni ne plendu pri tio! La Fondaĵo Afriko ĝuas la favoron de la verda publiko. Sed tamen... ne sufiĉe. Kaj... ĝis kiam?

Dekmiloj da guldenoj devis veni el aliaj fontoj: el aliaj spezoj de UEA aŭ el kelkaj esceptaj donacegoj. Kaj la daŭreco de la donacado ne estas certa. Kio okazos se la sukcesoj en Afriko ne plu atingos la frontpaĝojn de la revuoj? Kio okazos kiam la novaĵo de nigraj gastoj en la kongresoj paliĝos? La ŝoko de apero de 13 afrikanoj en la jubilea kongreso de Varsovio estis taktika sukceso: ĉie ili ĝuis admiron, kaj centoj da fotoj poste aperis pri ili. Sed kio okazos post Brajtono, kie estis tri nigruloj kaj du alĝerianoj? Ili eĉ ne plu sidis sur la podio dum la inaŭguro, nek salutis la kongreson. Tio efikos ankaŭ mone. La enspezoj en la fondaĵo falos, nun aŭ poste, kiam homoj kutimiĝos aŭ laciĝos pri "Esperanto en Afriko".

Ni ekpensu pri solvoj por tiu eterna problemo. Ĉu la pli riĉaj esperantistoj en la mondo estos pretaj impostpagadi? Bona solvo estus se en *ĉiuj pagipovaj landoj* la pagipovaj esperantistoj sin devigus pagi ĉiujare impostón por triamonda fonduso aldone al sia kotizo por UEA. Pagipovaj esperantistoj en *nepagipovaj landoj* simile povus kontribui ĉiujare al enlanda fonduso por helpo al la tria mondo.

Ĉu tiaj kontribuoj ne estus egalaj al la nuna sistemo de donacado? Ne. Laŭ la nuna sistemo ĉiujare la donaconto devas mem decidi ĉu kontribui al iu fondaĵo. Laŭ la proponata sistemo li *unufoje por ĉiam* (ĝis nuligo de sia decido) sin devigas kontribui, kaj rajtigas ke UEA prenu monon el lia konto, aŭ "impostpagigu" lin. Ankaŭ en nepagipovaj landoj, simila sistema kotizado por triamonda fonduso povus multon fari: akcepti gastojn el aliaj kontinentoj kaj pagi iliajn flugbiletojn, sendadi materialojn, subvencii la afrankon de individua korespondado, ktp.

Mi tamen ne ŝajnigu kvazaŭ UEA estas la sola paganto de la agado en Afriko. Multegaj aliaj kontribuas, ĉu per fondusoj, ĉu per privata helpo al afrikaj korespondantoj. La kortuŝajn oferojn ni ne forbalau el nia memoro!

Survoje al memstareco

En Afriko oni trovas esperantistojn en tri organizaj strukturoj: la landa asocio, la loka klubo, la unuopulo en izola loko. Ne estas kontinenta organizo (kaj mi ĝis nun sukcesis malkuraĝigi la iniciatojn fondi ĝin).

La landa asocio havas nur du funkciojn: ĝi devas helpi kaj kunordigi la klubojn (do *servi* al ili, ne *estri* ilin), kaj ĝi devas reprezenti la esperantistojn je landa nivelo (ekzemple: en rilatoj kun la ŝtato, aŭ kun UEA). Tie kie ekzistas landa asocio, ĝi havu la respondecon pri la sialanda administrado. Ĝi havu, sed ne jam ĉie havas. Fakte nemultaj estas la asocioj kiuj atingis ian memstarecon. Pluraj aliaj nur laŭnome estas landaj asocioj. Ili ne estas fortaj, aŭ ili ne estas fidindaj.

Ni komencis, en 1989, laŭcele plifortigadi la memstarecon de tiuj landaj asocioj, kiuj principe kapablas porti respondecon. Ili ricevu la helpon de UEA al sia centra adreso, kaj mem respondecu pri distribuo enlanda. Tiklaj problemoj estas i.a.: la kontrolo pri la spezoj, la divido de la dispo-

nebla mono, kaj la konsidero de aliaj donacoj en la financado.

Tie kie ekzistas ne landa asocio, sed ja kluboj, la subvenciadon faras UEA mem, kaj ne estas demando pri loka memstareco. Tio ankaŭ validas por unuopuloj. Kompense, aperas aliaj problemoj, ekz.: ĵaluzo inter kluboj kaj unuopuloj, kaj la justa asigno de subvencioj.

Du pliaj ekzemploj

Por fini, mi donos du ekzemplojn. Mi jam tedis vin plurfoje per mia asertado, ke ĉefe gravas la *utiligado* de la lingvo kaj la *memstarigo* de asocioj.

1. Utiligadon mi difinis kiel: internaciajn kontaktojn, kaj kluban vivon. La kluba vivo donas socian kadron, donas varmajn personajn kontaktojn. Mi volas doni ne malgravan kompletigon. Ne nur socia vivo interne de la klubo estas grava, sed ankaŭ funkciado de la klubo en la vasta socio. Ekzemplo: la landa asocio en Togolando partoprenigis siajn klubojn kaj unuopajn membrojn en arbariga kampanjo en la nordo de la lando. Alia ekzemplo: esperantistoj diskonigis turismajn informojn pri sia lando. Tria ekzemplo: junulara grupo prezentis muzikan spektaklon por granda publiko dum nacia festo. Ju pli esperantistoj partoprenas en tiaj aferoj (eĉ se tiuj havas nur etan rilaton kun Esperanto), des pli ili iĝos socie respektataj. Plej bone, kompreneble, se la lingvo iel rolis utile por la partoprenaĵo.

2. Memstarigo ne estas nur afero de administrado, sed ankaŭ de agado. Kial afrikanoj ne havu siajn kongresojn, ekzemple? La unua eksperimento kongresi en Afriko okazos ĉirkaŭ la jarŝanĝo 1990-91. Inviti blankulojn al Afriko estas eble pli bona solvo ol inverse – ekonomie kaj morale.

Mia espero

Mi esperas ke tiu ĉi artikolo kontribuos al pli bona kompreno pri la strategio de Esperanto en Afriko, kaj eĉ aliloke (en la tria, dua, kaj unua mondoj). Individuaj legantoj povas trovi en ĝi ideojn por kunlabori. Gvidantoj de la movado povas trovi en ĝi brikojn por pavimi la vojon de Esperanto en la naŭdekaj jaroj. Mi estos feliĉa se tiu ĉi artikolo ne restos seneĥa.

Hans Bakker
Kastelenstr. 231-II
NL-1082 EG Amsterdam
Nederlando

Landa agado:

La Brazilo de afrika Esperantujo

Jam de longe mi intencis vojaĝi al Afriko. En la Roterdama UK mi proponis miajn servojn al Hans Bakker. Pro unujara vojaĝo en Amerikoj mi ne regule korespondis kun li, kaj nur en Brajtono mi eksciis ke lia rekomendita celo estas Zairio.

Laŭ liaj klarigoj, mi ekkomprenis ke la koro de la zairia movado situas en Lukala, ducent kilometrojn okcidente de la ĉefurbo Kinŝaso. La ĉefurbo similas laŭ multaj aspektoj kelkajn grandajn urbojn en nordorienta Brazilo. Fakte Zairio mem havas preskaŭ la saman pozicion en Afriko, kiel Brazilo en Sudameriko: la ekvatoro, la vasteco, la riverego, la arbarego, la popolo, la vivmaniero.... Mi ŝatus aldoni ankoraŭ – la lingvon: ĉar laŭ mi post ne longe troveblos en Zairio tiom da esperantistoj, kiom en Brazilo!

Rapide mi direktiĝis al Lukala. La esperantistaro atendis min ĉe la enirejo de la vilaĝo – kia oni oficiale konsideras tiun lokon de tridek mil homoj. Sed la *sardel*-buso (en kiu la pasaĝeroj estis pakitaj kiel sardinoj, tamen sen oleo!) demetis min je la alia flanko. Nur post noktiĝo ni renkontiĝis. La tuttaga atendado tamen ne elĉerpis ilian ĝojon aŭ bonvenigemon.

Tie en Lukala s-ro Ngangu, la prezidanto de Esperanto-Instituto de Zairio, sukcesis esperantistigi plurajn centojn da homoj. Laŭ la statistikoj, nur en tiu urbo 771 lernantoj trapasis la unuagradan ekzamenon. Dum mia trisemajna restado, eĉ en kaŝitaj stratetoj oni salutis min Esperante. Mi miregis pri la altnivela rego de la lingvo kaj precipe pri la perfektaj prononco kaj akcentado. Miaj samlandanoj bonvolu pardoni min, sed multaj francaj esperantistoj povus profiti de vizito al Lukala por perfektiĝi!

"Kiam mi enlitiĝis,
mia gastiganto komencis
rekopii mian vortaron
per la lumo de
ŝanceliĝanta lampo."

Deko da infanoj ekpartoprenis mian unuan Cseh-kurson. Iom post iom la klasĉambro pleniĝis, kaj multaj nigraj kapoj aperis ĉe la fenestro kaj la pordo. Ilia scivolemo kompreneble celis parte la blankulon, tamen ankaŭ la Cseh-metodo montriĝis alloga. Ĝi sendube estas pli kaj pli uzota en Afriko, ĉar ĝi perfekte adaptiĝas al la spontana gajeco de la afrikanoj.

Bonŝance, mia licea grupo en Kinŝaso konsistis el deko da ĉarmaj

lernantinoj. Mi plurfoje konstatis dum UK, kiel virinoj miras pri la ĉeesto nur de afrikaj viroj. Ankaŭ en Zairio malabundas virinoj, kiuj regas la lingvon. Se Esperanto devas harmonie disvastiĝi en ĉiuj landoj, ĝi same harmonie devas reprezenti ambaŭ seksojn. Mi do ĉie emfazis la neceson esperantistigi la afrikaninojn.

Krom Lukala mi vizitis plurajn aliajn klubojn. Memorinda estas tranokto en vilaĝeto ĉe s-ro Mbemba, kamparano kiu malgraŭ la malfacilaĵoj sukcesis lerni Esperanton kaj krei klubon. Kiam mi enlitiĝis, li komencis rekopii mian vortaron per la lumo de ŝanceliĝanta lampo. Ĉar mi intencis foriri frumatene, je la 5-a li reflamigis la petrollampon kaj daŭrigis sian senfinan taskon.

Al ĉiuj vizititaj kluboj mi klarigis, ke la helpo el riĉaj landoj al individuoj ofte ne profitigas la movadon. Ili devas grupiĝi kaj organizi siajn klubojn laŭ racia sistemo. Tiucele mi laboris kun ili por starigi bibliotekojn kun serioza pruntedona funkcio. Ĉiuj cetere konsentis pri kotiz-sistemo por la kluboj aligitaj al la landa asocio, Esperanto-Instituto de Zairio. Mi do konsilas estonte subteni precipe la klubojn de EIZ – kvankam ekzemple vortaroj restas tre taŭga donaco por individuoj.

Kaj se temas pri subteno – mi alvokas la esperantistaron: "Ĝemeligu vian klubon kun zairia klubo!" Tiucele ni kunigis la klubojn tiel, ke nur po unu adreso en ĉiu urbo reprezentas la lokan movadon. Ekzemple en Kinŝaso estis 12 kluboj! Nun ekzistas nur Kinŝasa Esperanto-Centro.

Post prelegoj kaj du televidelsendoj, abundas la lernodezirantoj. La ĉefa problemo estas havigi al EIZ sidejon en la ĉefurbo por kontentigi ilin. Verŝajne la Bahaanoj kaj aliaj kulturaj centroj disponigos lernoĉambrojn, sed tio konvenas nur kiel provizora solvo. Esperanto devas prezenti sin antaŭ la aŭtoritatoj kiel sendependa kaj memstara asocio. Via subtenado bonvenas.

Mi ne dubas, ke la movado povas mirige kreski en tiu lando, kie aktivas sindonemaj kaj kompetentaj esperantistoj. Ili bezonas nur solidan kaj stabilan bazon por memstare disvolviĝi.

Philippe Chavignon

Maldekstre:
"Mi vere sentis min en Esperantujo kiel neniam antaŭe en aliaj landoj," ravite raportis Chavignon, meze de lukalanoj.



En vilaĝo apud Parakou, Benino

Vojaĝimpresoj:

Ĉu iam reveni? Jes!

Armitaj per sako da Esperantaj libroj, sako da koloraj skribiloj, medikamentoj, gvidlibro kaj la adresaroj de Hans Bakker kaj Helga Farukuoye, nia familio flugis de Londono ĝis Lagos, Niĝerio.

Ni iom timis la alvenon. Ricevinte nur unu respondon de niĝeria esperantisto, kiu loĝas en fora urbo, ni serĉis ajnan esperantiston kun loĝadreso. La straton konis la taksiisto. Granda domo kun multaj apartamentoj kaj loĝĉambroj sen numeroj. Lacertoj ĉie. Transloĝiĝis unu esperantisto; la alia malĉeestas. Sed la najbaro bonvenigas nin. Li tiel bonkore traktis nin dum la sekvantaj du tagoj, ke ni forgesis entute nian timon.

Konstateblis, ke duono el la homoj en Niĝerio estas malpli ol 17-jaraj. Ni miris tamen, ke nia serĉata esperantisto estas nur 17-jara, kaj miradis, ke pli ol duono el la esperantistoj en Niĝerio estas malpli ol 17-jaraj. Ili estas entuziasmaj kaj vivas en multlingva medio. Homo kiu konas kvar afrikajn lingvojn kaj la anglan ne nepre havas komunan lingvon kun iu en najbara Benino kiu parolas kvar afrikajn lingvojn kaj la francan. Lingvoj ne timigas ilin – sed la koncepto pri gramatiko ofte forfalas. La angla instruata en lernejoj havas pli lozan gramatikon, ol tiu instruata en Anglio (kaj cetere tute malsaman prononcon).

La Esperanto-lernantoj estas ĉefe studentoj, kies gepatroj estas sufiĉe riĉaj por aĉeti lernej-uniformon kaj kajerojn. Ili tamen precipe vivas en modestaj kondiĉoj, sub minaco de malboniĝo pro la ekonomia situacio. Ni trovis, ke en vilaĝoj la esperantistoj kutime havas sufiĉan spacon por gastigi nin. En urboj, kie oni ofte havas nur unu-du malgrandajn ĉambrojn, ili helpis nin elserĉi modestan hotelon. Dufoje ni gastis en lernejo pro la helpemo de ne-esperantistaj lernejestroj.

Ĉiuloke oni akceptis nin entuziasme, volonte partoprenis rektmetodan lecionon, lernis kantojn kaj faris demandojn. Per unusola leciono eblis instrui prononcon, sentigi la realecon de Esperanto, kaj kuraĝigi. La homoj tie ne ĉesas esperi, ne ĉesas labori, lukti kaj serĉi plibonigon. Se mi sukcesis iel kuraĝigi esperantistojn en Afriko, ili pli certe sukcesis kuraĝigi min! Mi konfesas, tamen, ke mi tristas pro la virinoj, kiuj komencas sian deĵoradon estante nur knabinetoj, kaj ne havas tempon aŭ taŭgan etoson por lerni Esperanton.

Nia vojaĝo, per loka transporto, daŭris tra Benino, Togo, Ganao kaj Ebura Bordo. Dum preskaŭ la tuta vojaĝo ni vizitadis esperantistojn kaj rilatis kun ili. Tial ni neniam sentis nin izolitaj aŭ senamikaj. Nin plej impresis la progreso de la movado en Togo, kie estas kelkaj fluaj parolantoj kiuj instruas precipe laŭ naturmetodo.

Loko, en kiu oni havas amikojn, iĝas vivanta anstataŭ nur spaco sur mapo. Tia estas nun okcidenta Afriko por nia tuta familio. La infanoj ludis kun amikoj kun aŭ sen komuna lingvo, sed ankaŭ ili trovis, ke Esperanto vivas kaj utilas. John estis komencanto en Lagos sed konversacianto en Abiĝano. "Ĉu iam reveni?" mi demandis ilin. "Jes!" ili unuvoĉe respondis.

Sally Phillips (Britio)

Internacia Alfabetiga Jaro 1990:

Kunlabori por la sama celo

En la novembra kaj decembra numeroj aperis artikoloj pri la problemo kaj signifo de nelegipovo, kaj la respondo de Unesko. Sed kiel la nelegipovo tuŝas nin, la esperantistojn? Unuavice per baza paraleleco en la celoj kaj rimedoj.

Movado por internacia alfabetigo

Same kiel alfabetigo en nacia lingvo liberigas la menson de ĝia nur loka perspektivo, tiel alfabetigo en la internacia lingvo malfermas pordon al vere tutmonda pensado. La similecoj estas frapaj. Unesko lokas la alfabetigon centre en sia strebado "doni kulturan dimension al la evoluo", laŭ ĝia ĝenerala direktoro Federico Major. "Ni parolas pri fundamenta homa rajto, kaj Unesko povas nur emfazi kiel eble plej plenan disvolvon de la potencialoj kaj kapabloj de ĉiu individuo." Sed stimuli tiun disvolvon estas malfacile. "Oni ne igas la homojn legipovaj: ili legipovigas sin, kiam ekzistas taŭga motivo kaj instigo. Tial alfabetigaj agadoj nepre bezonas la apogon de post-alfabetigaj programoj.... Iuj grupoj en la socio bezonas specialan helpon kaj atenton.... Kaj ĉio ĉi devas servi al la vera progreso kaj sendependiĝo de la individuo kaj la socio, donante al ili novajn kapablojn."

Tiuj frazoj kvazaŭ resumas la celojn kaj problemojn de la Esperanto-movado. Ni laboras por malfermi al la homoj rektan aliron al internaciaj kontaktoj kaj informoj. La komunikado por ni staras centre en la evoluo de ĉiu homo kaj ĉiu socio, centre en ĉiu kulturo. La rajton je komunikado ni celas igi pli vasta ol ĝi iam estis. Sed kiel legipovuloj en nelegipova socio, ni frontas malfacilaĵojn transdoni tiun kapablon. Tro malofte ekzistas "taŭga motivo kaj instigo". Niaj postalfabetigaj programoj lamas. Kaj multaj "novaj kapabloj", kiujn principe povus peri Esperanto, pro tio restas nur latentaj.

Tamen la evoluo de la alfabetigo povas kuraĝigi nin. Kiel Esperanto, ĝi estas homa inventaĵo. Dum jarmiloj ĝi restis limigita al malgranda tavolo de la socio. Sed la presmaŝino kaj la disvastiĝo de baza edukado survojas fari la legipovon universala. Ĝia potenco atendis nur taŭgan momenton por plena disvolviĝo.

Kunlabori por reciproka utilo

Malgraŭ la paraleleco de alfabetigo en nacia kaj internacia lingvoj, ne ĉiam estas facile kunligi la du. Preskaŭ ĉiam, alfabetigo en la nacia lingvo estas pli urĝa kaj utila; nur poste oni eble trovos tempon por Esperanto. Sed ekzistas kelkaj ŝancoj por kunlaboro.

"La rajton je komunikado ni celas igi pli vasta ol ĝi iam estis. Sed kiel legipovuloj en nelegipova socio, ni frontas malfacilaĵojn transdoni tiun kapablon."

Komuna kurso: Esperantistoj en Benino organizis, inter decembro 1989 kaj februaro 1990, 24-lecionan Esperanto-kurson en la ĉefurbo Cotonou. Aldone, ili proponas ŝancon alfabetiĝi en la gravaj lokaj lingvoj Adja kaj Fon al tiuj kursanoj, kiuj ne jam perfekte legas kaj skribas en tiuj lingvoj. Jen modela agado: La kurso akiras ekstran allogon, donas ekstran utilon kaj prezentas Esperanton en plej konvena kadro al la publiko kaj la oficialaj instancoj. Ne nur la evolulandoj povus sekvi tiun ekzemplon.

Diskonigo: Alfabetigaj organizaĵoj spertas problemojn, kiel ni, en komunikado kun la publiko. Nelegipovuloj estas ofte konsideritaj kiel malsanuloj aŭ mensmalfortuloj. La amplekso de la nelegipovo, ankaŭ en la industriaj landoj, ĝenerale ne estas konata. Esperantistoj povas kunlabori en la diskonigo de la problemo kaj ĝiaj solvoj. Kluboj povas gastigi preleganton pri la temo. Revuoj povas aperigi artikolojn (represante, ekzemple, ĉi tiun tri-eran serion). La 46-a Internacia Junulara Kongreso en Kubo havos kiel ĉeftemon "alfabetigo": aliaj kongresoj povas dediĉi kunsidon aŭ seminarion al la temo. Ekzistas ankaŭ eldonaj ebloj. En Japanio, Yukio Izumi kaj Keiko Syozi kunlaboras pri Esperanta versio de alfabetigo-infanlibro, kiun aperigis la Azia Kultura Centro de Unesko. Nian agadon limigas nur niaj energio kaj imagopovo. Kaj ĝi povas riĉigi ankaŭ nian agadon por kaj per Esperanto.

Alfabetigo en la Esperanta komunumo

Nia lingvokomunumo estas unika, ĉar ĝi ne konas la nelegipovon. Tion almenaŭ oni foje diras. Sed ĉu legipovo estas io tiel absoluta? Estas vasta gamo da kapabloj inter la pena deĉifrado de baza legolibro kaj la ĝuado

La 24-lecionan kurson en Cotonou preparas (de maldekstre) Tchikpe Privas, Dossou Edouard kaj Alofa Jerome Charles. Ĉu eblas pli ofte simile ligi alfabetigon en nacia lingvo kun la instruado de Esperanto?





de la poezio de Auld aŭ la prozo de Schwarz. Tiurilate ni ne tiom bone fartas. Kiom da esperantistoj kapablas legi aŭ skribi samnivele, kiel en sia denaska lingvo? Manpleno, por diri honeste. Ne temas pri tio, ke la lingvo tro malfacilas aŭ la homoj tro stultas, sed simple ke mankas la motivoj kaj la edukaj rimedoj, kiuj karakterizas la naciajn lingvojn.

Ne baldaŭ venos solvo al tio. Sed ni almenaŭ konsciu pri la amplekseco de la problemo, kaj laboru laŭeble por forigi ĝin. Esperantisto, kiu ĉesas lerni, kiu ĉesas plibonigi sian regon kaj ĝuon de la lingvo, ekmalpartoprenas en la alfabetiga strebo, kiu estas la esenco de nia movado. Tial tiom gravas la kursoj, la libroj, la revuoj. Ili estas la iloj de dua alfabetiga revolucio, kiuj ebligas al ĉiu partoprenanto kaj leganto vastigi sian konscion kaj kapablojn. Kaj kun Unesko ni povas nomi tion nia vera celo.

Mark Fettes

Inter la materialoj eldonitaj de Unesko por la Internacia Alfabetiga Jaro – kutime en la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa – troviĝas i.a. la afiŝo montrita supre, la broŝuro "Praktika gvidilo por neregistaraj organizaĵoj, aligitaj lernejoj kaj aliaj interesataj grupoj", novaĵleteroj kaj faktfolioj. Petu senpagajn ekzemplerojn de la Sekretariato, Internacia Alfabetiga Jaro, Unesko, 7 place de Fontenoy, F-75700 Paris, Francio, nepre menciante ĉi tiun revuon kiel kaŭzon de via interesiĝo.

Instruado:

La ĉina movado troviĝas ĉe vojkruciĝo

Al la unua Azia Konferenco pri la Instruado de Esperanto, 6-11 novembro 1989 en Nanning, Ĉinio, venis kelkaj eksterlandanoj plus partoprenantoj el ĉiuj gravaj regionoj de Ĉinio. Por la unuaj, el Belgio, Estonio, Japanio, Koreio, Usono kaj Svedio, temis pri okazo rekte konatiĝi kun la ĉina movado. Al la duaj la konferenco permesis iomete trarompi la internan izolitecon de la ĉinaj aktivuloj, kiuj pro la grandaj distancoj ne ofte povas interkonatiĝi kaj interŝanĝi siajn spertojn kaj ideojn. Multaj partoprenantoj trajnis tri ĝis ses tagojn, eĉ pli, por atingi Nanning.

La konferencon iniciatis kaj organizis Liang Ziming, docento ĉe la Guangxi-nacia Universitato en Nanning. Partoprenis i.a. la aganta ĝenerala sekretario de Ĉina E-Ligo, Liu Ling, kaj la landa sekciestro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Zhang Danchen. Lokan Ekzamenan Komisionon prezidis Li Weilun, vicprofesoro ĉe la Fremdlingva Fakultato de la Pekina Lingva Universitato, kaj kun li mi longe kaj detale pritraktis la organizon de la Internaciaj Ekzamenoj kaj ilian adapton al la ĉinaj cirkonstancoj. Po ok homoj prezentis sin por la elementa kaj meza niveloj okaze de la konferenco.

Kreo de regionaj centroj

Tre kuraĝiga por la ĉinaj partoprenantoj estis la ĉeesto de d-ro So Gilsu, la nova UEA-estrarano pri Azio, kaj mi mem, kiel prezidanto de ILEI. D-ro So dediĉis tutan matenon al esplordemandado de ĉiuj regionaj reprezentantoj pri la situacio de Esperanto en iliaj lokaj agadmedioj. Oni unuanime konsentis pri tio, ke oni ne kreu tro vastan kaj grandskalan edukejon en unu loko, ekzemple Ŝanhajo, sed starigu plurajn regionajn edukajn centrojn, bone ekipitajn, nur tie kie ekzistas kerno de fidindaj, realismaj kaj kapablaj esperantistoj. Pro transpagproblemoj, plej multaj esperantistoj ne povas aboni eksterlandajn revuojn aŭ aĉeti eksterlandajn librojn. La Azia Fondaĵo de UEA eventuale povos fari ion sur tiu kampo.

Por ILEI, la esenca kaj plej urĝa tasko konsistas en la pliperfektigo de la instruantaro. Mi atendas rekomendojn de Li Weilun por organizi provsesion de kurso plus ekzameno, analoge al tiuj en La Chaux-de-Fonds. Mi ankaŭ instigis al la listigo de ĉiuj E-instruistoj, precipe en la grandaj centroj, kun ties fakkapablo kaj preteco kunlabori. Mankas tuta gamo de modernaj lerniloj kaj legaĵoj. Surbaze de la Internaciaj Ekzamenoj, kiuj estis aparte bonvenaj, oni nun intencas pli sisteme ellabori tiajn materialojn. Sendube ekzistas ebloj pri kunlaboro sur diversaj kampoj, ekzemple tiu de eldonado, kio povus parte solvi la problemon de la kotizoj kaj precipe de la necesa lernmaterialo.

Grava bezono: pli vasta aplikado

El multaj raportoj kaj konversacioj klare evidentiĝis, ke la ĝenerala intereso pri Esperanto ĉe la studentoj serioze malkreskas. En multaj kursoj ne plu estas studentoj, ĉar ili ne vidas la tujan utilecon kaj uzeblecon de la lingvo. La ĉinoj devos kalkuli je tiu fakto ellaborante novan strategion. Entute la situacio ne estas tiom malbona, male. Sed la movado tie troviĝas ĉe vojkruciĝo.

Dum larĝaj intervenoj kaj debatoj, pluraj homoj faris konkretajn proponojn. Liu Weizhuang, deĵoranto ĉe la E-Asocio de Sciencteknika Asocio Guangzhou, proponas organizi turisman-kulturan vojaĝon en Ĉinio laŭ plej favoraj kondiĉoj. Nur la flugo ĝis Pekino aŭ Honkongo estus mendita el Eŭropo, la rondvojaĝon en Ĉinio organizus la esperantistoj mem laŭ enlandaj tarifoj kaj kondiĉoj. Tiu "eŭropa karavano" ne nepre konsistus nur el instruistoj, estus loko ankaŭ por komercistoj, kuracistoj k.a. La propono devos maturiĝi, sed ĝi certe estas realigebla.

Lu Jixin, oficisto el Guilin, kaj Cui Jianhua, docentino pri la franca lingvo ĉe Universitato Nanjing, multe interesiĝas pri interŝanĝoj de poezio kaj literaturo ĝenerale inter Ĉinio kaj la cetera mondo. Prof. Soliva (Shao Rong), de la Fakultato de Aplika Matematiko en la Teknika Instituto de Dalian, verkas lernolibrojn pri la teknika apliko de Esperanto kaj meritas plenan apogon.

Edward Symoens (Belgio)

Esplorvojaĝo tra Azio:

La movado plifortiĝas rande de Pacifiko

Pro vizaj kaj monaj problemoj, mi ne sukcesis viziti novajn landojn dum la lasta parto de mia esplorvojaĝo. Nun mi opinias tiun periodon ne perdita, ĉar, havante pli da libera tempo ol kutime, mi povis labori senstreĉe kaj aranĝi aliajn aferojn, krom la instruado de Esperanto.

Entute 60 komencantoj en Malajzio

Supozeble vi memoras, ke en aprilo komenciĝis la Esperanto-movado en Koalalumpo. La nova Malajzia E-Asocio, en kiu membriĝis ĉirkaŭ 30 personoj, de tiam okazigas regulajn kunvenojn, kvankam la nombro de aktivaj membroj malgrandiĝis ĝis proksimume deko. Kelkaj jam parolas la lingvon kontentige. Tamen ili ne agas ekstere, ĉar la asocio ankoraŭ ne estas registrita. Oni estas tre suspektema pri novaj internaciaj ideoj en Malajzio.

Utiligante mian ekstran tempon, mi decidis plifortigi la malajzian movadon. Kiel kutime, mi instruis tie dum tri semajnoj en intensa kurso. Ĉi tie mi devus danki al la Societo de Pura Vivo en Koalalumpo, kiu senpage disponigis al mi klasĉambron. Meze de novembro 15 novaj lernintoj ricevis la atestilon. Resume pri 1989 oni povas diri, ke proksimume 60 homoj almenaŭ komencis lerni Esperanton, dum centoj da miloj de malajzianoj povis legi pri la lingvo en la gazetaro.

Nun Malajzia Esperanto-Asocio atendas viajn instigon, helpon (libroj, gazetoj, informiloj), proponojn, konsilojn. Kiam ĝi estos oficiale registrita, oni antaŭvidas kursojn korespondan kaj ejan. Vojaĝagentejo en Koalalumpo volas lanĉi Esperantan turismon, se ĝi povas trovi kunlaborantojn eksterlande. Ĉiujn sendaĵojn adresu al: Zainuddin Zakaria, Merlin Hotel, 2 Jln Sultan Ismail, 50250 Kuala Lumpur.

Moderna movado aperas en Singapuro

La lastan monaton de la esplorvojaĝo mi devis pasigi en Singapuro. Bedaŭrinde mi ne ricevis permeson (de la Pasporta Departemento) organizi novan kurson, kvankam pli ol 200 homoj estas registritaj kaj atendas de majo 1989. Espereble ili povos lerni en majo 1990. Mi tamen instruis Esperanton en progresiga kurso al grupo de dek-kelkaj lernintoj. Tiu nemultnombra grupo konsistigas la kernon de la singapura movado. Pro similaj kialoj kiel en Malajzio, ili ankoraŭ ne kuraĝas aktivi, precipe ekstere; tamen ili regule kunvenas kaj realigas societan vivon. La gvidantino de la movadeto, Lee Kim Kiew, konsilis al mi: "Ne insistu nun, ne instigu ilin tro, lasu ilin alkutimiĝi kaj kompreni la ideon. Dume la registro espereble okazos kaj ni povos oficiale agi." Iom komprenante la politikon kaj cirkonstancojn de la vivo en Singapuro, mi konsentas kun ŝia opinio.

Ekzistas, tamen, influhavaj personoj kiuj ne bezonas longan konvinkadon. Al tiuj apartenas la estro de la fako pri publikaj klerigokursoj ĉe la Nacia Universitato de Singapuro. La fako okazigas interalie lingvokursojn, kaj la estro volonte akceptis proponon pri instruado de Esperanto en tiu prestiĝa kadro. Baldaŭ la singapuranoj ekscios pri E-kurso okazonta dum majo kaj junio en la universitato.

Ĝenerale mi konstatis, ke la singapuranojn ekinteresas la internacia lingvo. Ili apogas la ideon malgraŭ tio, ke la angla lingvo donas al ili la ĉiutagan panon: la tuta ekonomio efike progresas kaj brile modernigas la landon dank' al la uzado de la angla, precipe en la internacia komerco. La unua ekfloro de Esperanto ĉi tie mortis pro persekutoj fare de la tiama kolonisma registaro. Nun denove ekzistas movadeto. Sendu moralan kaj materialan helpon al ili ĉe la adreso: 11 Jalan Batu, #04-152, Singapore 1543.

Joachim Werdin
ekde decembro denove atingebla ĉe
Pionierów 6 A 9,
PL-47-220 Kędzierzyn-Koźle,
Pollando



Kunsido de la movada kerno en Singapuro. La individua membraro de UEA tie saltis de nulo ĝis pli ol deko post la vizito de Werdin. Kiom da lokoj en Azio havas similan potencialon?

Intervjuo kun Xue Meixian:

Se la Estraro faros proponon, ĉinoj diligente plenumos ĝin

Dum plenaj tri monatoj post la Universala Kongreso en Brajtono volontulis en la Centra Oficejo s-ino Xue Meixian, ĵurnalisto ĉe la Esperanto-elsendoj de Radio Pekino. Ŝi estis la unua ĉina volontulo, kiu venis post neformala interkonsento inter UEA kaj Ĉina Esperanto-Ligo fine de 1988. Temas pri la transdono de spertoj. Efektive, malgraŭ antaŭa restado en eksterlando, Meixian – aŭ Rozo, kiel ni esperantige nomas ŝin – trovis plurajn surprizojn dum sia tempo en Nederlando.

Mi metas al ŝi la kutiman demandon pri esperantistiĝo.

"Mi sekvis kurson pri Esperanto ĉe Radio Pekino en 1964. Tiutempe estis jam tri esperantistoj ĉe la radio, kiu komencis siajn E-elsendojn en decembro 1964. Post du jaroj aliĝis ni kursanoj. Komence estis nur du elsendoj semajne. Nun entute deĵoras ok el ni, por kvar elsendoj tage." Meixian parolas zorge kaj precize, kvazaŭ paŝante sur altŝnuro. Ĉu trajto de radioĵurnalisto, aŭ de esperantisto sen la sekurzono de eŭropa lingvofono?

"Vi parolas tre bone," mi komplimentas ŝin. "Supozeble la laboro kiel profesia esperantisto helpis poluri vian Esperanton?"

"Nu, ĉiuj ok estas esperantistoj, sed ni uzas Esperanton nur lege kaj traduke." Meixian ŝajnas iom embarasita. "Ni sentas, ke ni malbone parolas Esperanton, sed tamen ni evitas uzi ĝin pri ĉiutagaj aferoj. Mi mem parolas de longa tempo, gvidis konversacian kurson... ankaŭ tiun televidan filmon el Ĉindao. En ĝi mezlernejanoj rolis kiel la aktoroj. Mi sukcesis instrui al ili en unu monato ĝuste prononci Esperanton. Pri tio mi ĝojas... sed mi estas iom maltrankvila, ĉar ili fakte ne bone ellernis la lingvon kaj ankaŭ post la kurso ili ne povis libere paroli. Kiel vi scias, mankas okazo praktiki la lingvon. Eble post la reveno mi kontaktos ilin."

"Praktikado ja estas la ĉefa problemo por la ĉina movado, ĉu ne? Ĉu via restado ĉi tie donis al vi iujn ideojn tiurilate?"

Je mia surprizo, Meixian entuziasmas pri la kluba vivo en Nederlando. "Mi plurfoje ĉeestis renkontiĝojn ĉi tie, kaj mi miris, ke oni tiel ĝoje venas al kunsido! Ĉiam sentiĝas agrabla, intima etoso, ĉiuj parolas Esperanton. En ĉinaj kluboj oni plej ofte ne kuraĝas paroli, oni renkontiĝas nur tre malofte – nur ekzemple je Zamenhof-festo. Sed ĉi tiaj kunsidoj havigus al ni ŝancon praktiki la lingvon." Ŝi hezitas, serĉante bazon por komparo. "Kompreneble la kondiĉoj estas malsamaj. Tre surprizis min la komplika funkciado de la Esperanto-movado en Nederlando. Troviĝas societoj laŭ religioj, politiko, diversaj fakoj. En Ĉinio la movado funkcias precipe sur regiona bazo."

"Ĉu ankaŭ en la Centra Oficejo vi trovis surprizojn?" mi demandas, eble iom nediplomate, kaj ni ambaŭ ridas.

"Tre plaĉis al mi la maniero labori," Meizian konfesas. "Ĉiu memstare laboras pri sia propra tasko, diligente, kvankam direktoro prizorgas pri la tuto. Oni rimarkas la harmonian etoson. Aferoj iras sur sia vojo en bona ordo, kio estas tre kuraĝiga. Ĉe ni – ĉiam estas kontrolado, neniu laboras memstare. Mi vidis, ke en okcidento oni bezonas malpli da homoj por la samaj taskoj." Ŝia voĉo momente malgajiĝis. "Mia vizito estis tre bona ŝanco por lerni, sed mi faris tro malmulte. Tamen mi profitis la restadon, precipe dum la unua kunsido de la nova estraro." Kaj kun pli da viglo: "Neniam antaŭe estis tiom bona ŝanco! Estas grave, ke mi informiĝis pri la planoj pri estonta laboro."

"Kaj via impreso pri la planoj por Azio?"

La rido de Meixian, kiel mi lernis dum ŝia restado, pli ofte esprimas maltrankvilon ol amuziĝon. "Antaŭe mi ne pensis ke la planoj por Azia Centro aŭ Azia Edukejo sukcesos. La projekto ŝajnis iom grandioza, precipe pro la iom granda monsumo. Tamen kiam oni parolas pri tutmondigo mi atendas, ke UEA faros ion por disvolvi Esperanton en Azio. Sed laŭ la paroloj, kiujn mi aŭdis de la nova estraro, ŝajnas ke ne baldaŭ okazos io."

Ĉe tiu opinio Meixian restas, malgraŭ miaj provoj klarigi la malakcepton de unusola centro en Ŝanhajo. Mi fuĝas en demandon: Kion ŝi opinias la plej utila afero, kiun UEA povus doni al la ĉina movado?

"Se la estraro faros proponon, ĉinoj diligente plenumos ĝin." Sed ĉu ne devus esti Ĉina Esperanto-Ligo, kiu venu kun propono? Ĉu ne troviĝas konflikto inter la atendoj de ĈEL kaj la atendoj de UEA? Meixian koncedas: "Estas grave, ke ĈEL havu siajn proprajn ideojn. Ankaŭ UEA povus informiĝi pli bone. Mi pensas, ke ĝenerale oni havas bonan intencon sed ofte estas miskomprenoj. Ĉinoj estas viktimoj de tio."

Mi scivolas, ĉu la ĉinaj esperantistoj sentas sin izolitaj en sia vasta lando.

"Jes, foje ni sentas tion. Tamen se oni havas multajn korespondantojn tio povas mildiĝi. Niaj radioelsendoj havas aŭskultantojn en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo, kaj ili bone reagas. Parolante ĉi tie en Nederlando, mi rimarkis grandan soifon je informoj pri Ĉinio. Iom mi povis respondi al tio." Responde al mia demando, Meixian transiras al la zorgo, kiu okupis multajn okcidentanojn de post junio. "Kompreneble estis diversaj homoj, kiuj timas pro la situacio en Ĉinio. Principe estas libereco korespondi, sed lastatempe interrompiĝis kelkaj rilatoj. Eble kelkloke en Ĉinio oni ankaŭ timas. Sed mi kredas ke Esperanto estas traktata kiel aliaj aferoj kaj laboroj en Ĉinio kaj iros sian vojon sen esti influita de la sociaj problemoj. Ĝis nun ankoraŭ estas maljunaj gvidantoj, kiuj lernis Esperanton junaĝe, kaj ne malmultaj politikistoj komprenas la gravecon de la lingva problemo por Ĉinio. Por la Esperanto-movado ne estos granda problemo. Almenaŭ mi esperas tion."

intervjuis Mark Fettes

Motivado:

"Kaj post la kurso, kion?"

Lia vojaĝo tra Azio profunde konatigis Joachim Werdin kun la supra demando. Ĉi-artikole li meditas pri eblaj respondoj.

Kion mi faros kiam mi scios Esperanton? Ĉu mi povos uzi Esperanton? Kian profiton mi havos el Esperanto?

Tiujn kaj similajn demandojn ankaŭ vi aŭdis, eble de viaj kursanoj, eble de personoj al kiuj vi konsilis lerni la lingvon. Ĉu ni povas doni kontentigan respondon? Mi supozas ke ne ĉiam ni povas kontentigi la demandintojn, ĉar ni mem ofte ne scias kiel uzi Esperanton en la vivo. Ni traktas ĝin kiel hobion kiu plenigas parton de la libera tempo. Estas tamen homoj kiuj volas eniri la aferon pli profunden; do kion ni montru, kiujn eblecojn de Esperanto? Mi invitas vin al diskuto pri tio, kaj jen miaj respondoj:

1. Sendube vi povas *korespondi.* Miloj da homoj volas skribi leterojn al aliuloj per neŭtrala lingvo. Vi trovos korespondemulojn en kelkaj dekoj da landoj, se vi volos. La adresoj estas en pluraj Esperantaj gazetoj, ankaŭ vi povas aperigi anoncon tie, cetere ne nur pri la korespondemo. Ekzistas apartaj servoj por faciligi trovon de korespondemulo.

2. Partoprenu en esperantistaj aranĝoj naciaj kaj internaciaj. Miloj da ili okazas ĉiujare. La plej konataj estas la kongresoj de UEA kaj TEJO, konferencoj de fakaj organizaĵoj, kulturaj aranĝoj de esperantistaj centroj, internaciaj feriadoj kaj tendaroj.

3. *Aŭskultu* radiajn dissendojn en Esperanto por ekscii diversajn aferojn el pluraj landoj. El la 14 regule funkciantaj dissendoj vi povas aŭskulti kelkajn, tio dependas de via radioricevilo.

4. *Abonu* Esperantajn gazetojn: vi povas regule ricevadi kelkajn dekojn da ili. Pluraj el ili estas abonataj en pli ol 70 landoj. Ili estas riĉa fonto de informoj.

5. *Verku* por Esperantaj gazetoj. Multaj redaktistoj volonte akceptos viajn kontribuojn.

6. *Legu librojn* en Esperanto. Vi havos unikan ŝancon legi originalajn verkojn kiuj ekzistas nur en la Esperanta literaturo. Vi povos ankaŭ ĝui bonajn tradukojn (el naciaj literaturoj) de famaj verkoj. Ĉiu trovas ion por si.

7. *Verku aŭ traduku libron* kaj tiel vi kontribuos al pliriĉigo de la Esperanta (aŭ via nacia) literaturo.

8. *Evoluigu vian interesiĝon.* Funkcias pli ol 50 fakaj organizaĵoj internaciaj kiuj uzas Esperanton oficiale; vi povas aliĝi al iuj. Tiel vi kontaktos homojn, kiujn interesas la sama afero, do vi povos aktivi internaciskale.

9. Uzu Esperanton en via *profesia laboro.* Vi povas kontakti esperantistojn, kiuj havas saman profesion kiel vi, kaj evoluigi vian kunlaboron internaciskale. Tiel vi kontribuos al profesiigo de Esperanto.

10. *Studu aŭ instruu* en Akademio Internacia de la Sciencoj en Sanmarino. Unu el la oficialaj lingvoj de la akademio estas Esperanto.

11. *Turismo* per Esperanto. Kiam vi vojaĝas per neesperantistaj entreprenoj, vi vizitas lokojn kaj objektojn. Kiam vi vojaĝas per esperantista entrepreno, vi vizitas ĉion ĉi kaj ankaŭ amikiĝas kun homoj, vizitante anojn de la loka movado. Krome, pluraj Esperantaj entreprenoj ofertas relative nemultekostan turismadon. Eble vi volos uzi ankaŭ Pasportan Servon de TEJO; unue membriĝu en ĝi. Biciklu kun esperantistoj: Biciklista Esperantista Movado Internacia aranĝos tion por vi.

12. Fondu *internacian entreprenon* (komercan, turisman aŭ alian). Pluraj esperantistoj interesiĝas pri tio.

13. Vi povas ankaŭ *instrui* Esperanton. Ĉie sur Tero mankas kompetentaj instruistoj de la lingvo.

Kompreneble post ĉiu propono mi klarigas detale kiel ĉion aranĝi, se montriĝas intereso. Tiuj supraj ekzemploj konsistigas ne ĉiujn eblecojn de esperantoscio, krome ili estas ĝeneralaj. Ĉu vi povas doni pli da ekzemploj? Ĉu vi alimaniere respondus la demandon?

Joachim Werdin

Radio:

Nova ŝanco por vastigi la informadon

La aŭtoro de ĉi tiu teksto estas nova komisiito de la Estraro de UEA pri radioaferoj.

"Unu el niaj plej interesaj radioelsendoj estas *Civitana Radio,*" diris al mi red. Esko Kokkonen dum la vizitado de la radiodomo de Oulu-Radio en norda Finnlando. Mi tuj scivoleme demandis lin, en kio konsistas tiu "civitana radio"? La demando venis preskaŭ aŭtomate kaj mi ne supozis, ke ĝi rezultigos viglan interparolon, kies enhavon mi volas mallonge konigi al vi.

Evidentiĝis, ke "civitana radio" estas tre interesa finna iniciato, kiu verŝajne iom post iom estas utiligata ankaŭ en aliaj landoj. Temas pri ĉiusemajna radioelsendo – en la kazo de Oulu-Radio, ĝi estas unuhora – kiu kreiĝas laŭ la ideoj proponataj de aŭskultantoj kaj ankaŭ realigataj de ili, helpe de spertaj radioredaktoroj kaj teknikistoj. "Ĉiu civitano," informis min red. Kokkonen, "povas veni al nia radiostacio kaj proponi sian propran radioelsendon pri iu temo, kiu laŭ li/ŝi povus interesi ankaŭ aliajn aŭskultantojn. Oni pridiskutas la temon, la aŭskultanto ricevas konsilojn por ellaboro de scenaro kaj praktika realigo, radiostudion, sonbendojn, teknikistojn ktp. Kaj helpe de fakuloj oni realigas sian propran scenaron, kiu poste en la formo de preta radioelsendo estas prezentata en la normala ĉiusemajna programo Civitana Radio." Laŭ red. Kokkonen tio donas ŝancon al talentaj amatoroj prezenti ion interesan, pri kio ekzemple ili mem okupiĝas. Kadre de la "civitana radio" prezentiĝas ankaŭ amatoraj kantistoj kaj teatraj trupoj, plastikistoj rakontas pri siaj artaĵoj, radioamatoroj pri kontaktoj kun alilandanoj ktp. Mi tuj demandis la finnan ĵurnaliston, ĉu iam oni proponis al ili ian Esperantan temon? Evidentiĝis, ke ne, sed li reagis tre pozitive al la ideo.

Kaj do, ni ne hezitu, sed proponu Esperanton, tamen laŭeble en konkreta, sufiĉe alloga formo. Ne sufiĉas nur paroli pri Esperanto, necesas vendi la temon en bona pakumo. Mi supozas, ke "civitana radio" ekzistas en multaj landoj. Ni do utiligu ĝin, des pli ke – almenaŭ en Finnlando – tia afero estas tute senpaga.

Andrzej Pettyn (Pollando)

Informado 1

Difini nian merkaton

Ĉi tie aperos serio de ses artikoloj pri la moderna informado. Dum la lastaj jardekoj la reklamstrategio fulme evoluis. Pli kaj pli da kulturaj societoj sukcese transprenis kaj adaptis la malkovrojn, kiujn faris komercaj entreprenoj. Por agadi moderne, ankaŭ ni konatiĝu kun tiu evoluo. Tial mi provos skizi la ĉefajn trajtojn de nuntempa merkata strategio por societoj sen profitdona celo.

1. "Ni devas dediĉi nin al la disvastigo de Esperanto."

Anstataŭ admiri, mi emus ŝanĝi la starpunkton de tiu, kiu asertis tion. Zamenhof ne kreis Esperanton kiel celon en si mem. Li konfrontiĝis kun prema lingvoproblemo kaj sekve dediĉis sin al ĝia solvo. Tiel li spontanee aplikis por ni la unuan regulon, kiu validas en nuntempa entreprengvidado: pensi klientplaĉe, t.e. *pensi pri la bezonoj de la aliaj homoj* kaj ne pri venko de la propraj ideoj. Por informa laboro necesas resti aperta por ĉiuj lingvaj problemoj en nia ĉirkaŭaĵo. Ni demandu nin ĉu ni iel povas kontribui al ilia solvo. Eble necesas studado antaŭ ol elpaŝi publike. La unua fazo de la informado – esploro de la mankoj, pristudo de ĉiuj eblaj solvoj kaj taksado de iliaj konsekvencoj – ĝenerale estas tro mallonga kaj tro supraĵa ĉe ni.

En la praktiko, la apliko de tiu unua principo jam havas gravajn konsekvencojn. Tiu, kiu obsediĝas pri la "fina venko", riskas fariĝi altrudema kaj sekve ekziliĝi el multaj sociaj rondoj. *En informa laboro, aŭskulti estas pli grave ol pasie argumenti.* Inter la uzeblaj argumentoj utilas nur tiuj, kiuj persone tuŝas la personojn, kiujn ni volas informi.

2. "Ni devas vendi nian produkton, kreante bezonon je ĝi."

Plurfoje, mi jam aŭdis tiun frazon el la buŝo de homoj, kiuj volas modernigi nian agadon. Sed fakte ankaŭ ĝi signifas perforton de nia celo. Ni volas servi al la homaro kaj kontribui al pli harmoniaj internaciaj kontaktoj. *Esperanto estas nur rimedo, kaj la celo por uzi ĝin varias de individuo al individuo.* Estas iluzio kredi, ke ni povas krei bezonojn. Personoj, kiuj parolas pri kreo de bezonoj, pensas pri multaj objektoj de la moderna industrio, kiujn ni ne bezonas por bone vivi, sed kiuj tamen amase vendiĝas, kiel ekzemple kompakt-diskoj. Kiam ili aperis sur la merkato, tamen, la kaŝita bezono en la unua fazo de la reklamkampanjo povus esti: "aparteni al elita grupo, kiu nur kontentiĝas je plej alta kvalito". Posta fazo povus celi la bezonon: "aparteni al la amaso kaj fari kiel la plimulto".

La bezonoj do jam ekzistas, kaj ni devas konstante atenti ilin. Esperanto povus, ekzemple, kovri la bezonon je malgrandskaleco, je personaj rilatoj, je aparta pritrakto por ĉiu individuo. Tio certe validas en tro grandaj sociaj unuoj kiel grandurboj, amasferiejoj ktp. Por iuj potencialaj esperantistoj certe gravas la emo aparteni al grupo da homoj, kiuj konas pli da lingvoj ol la mezumo. Kontraŭe certe ekzistas grupo da homoj, kiuj ĝojas ĉar finfine ankaŭ ili sukcesas majstri unu fremdlingvon. La skalo de bezonoj estas ege subtila elemento en la informado.

* * *

La stilo de tiu ĉi unua artikolo estis intence agresema. Mi esperas provoki reagojn. Por kuraĝigi vin mi volas relativigi ĝian enhavon:

– Principoj de merkatado ne estas dogmoj. Ili daŭre adaptiĝas en nia ŝanĝiĝanta civilizacio.

– Eĉ plej lertaj merkatistoj faris eraregojn.

– Mi mem ne estas fakulo, sed nur akiris iom da scio per kelkaj kursoj, kelkaj libroj, kaj spertoj en la Esperanto-movado.

La debato estas malfermita!

Ivo Durwael
Via estrarano pri Informado



Aktivuloj:
Petu la novan informcirkuleron de la Centra Oficejo!

Strategio:

Investi por nia estonteco

Jean-Louis Texier, estrarano de UEA pri landa agado de 1986 ĝis 1989, venis al drasta konkludo el siaj esploroj dum tiu periodo. Ĉu UEA dediĉas siajn rimedojn al la ĝustaj celoj por certigi sian pluekziston?

La progreso de Esperanto dependas de 2 000 kursoj kaj ĉ. 30 000 eklernantoj jare, laŭ tutmonda enketo ĉe la landaj asocioj. Laŭ plimulto de la respondeculoj, jarfine restas nur 10% el la komencintoj, kaj tio apenaŭ kompensas la regulan perdon de 10% de la membraro. La Strategia Plano de UEA jam konstatis tiun malforton: nian malkapablon *krei la grandan nukleon de fluaj uzantoj* por fortigi la lingvon *laŭnombre kaj laŭkvalite.*

Ni tro facile forgesas pri tiu baza manko, artikolante en niaj revuoj, kunvenante en niaj etaj kongresoj. Niaj verkistoj aperigas siajn librojn en malpli ol 2 000 ekzempleroj: sensignifa kvanto! La limigiteco de niaj homaj rezervoj ofte kaŭzas, ke ni konservas gvidantojn 15 aŭ 20 jarojn ĉe la sama posteno, kion plej ofte rifuzus serioza firmao. Niaj gvidantoj mem ne venas el komerca fono: la Estraro de UEA, ekzemple, venas dutrione el kulturaj aŭ edukaj medioj. Kaj kiaj estas la procentoj en nia decidpova Komitato?

UEA bezonas reklaman projekton

La Strategia Plano donis prioritaton al informado. Tio respondas al plurjara peto de la landaj asocioj, kaj devas koncerni ne nur la pludonon de informmaterialoj al ili (interna informado) sed ankaŭ la portadon de tiuj informoj al la ekstera publiko. Tiun duan punkton ni ne prokrastu; ĝin ni

traktu ne nur kiel informadon, sed kiel reklamadon, ion por kio ni pretas rezervi kaj elspezi monon. Ni serĉu la rimedojn por kontroli ĝian efikon, adapti ĝin al la celgrupoj laŭ ilia filozofia, socia, politika evoluo. Temas fakte pri komerca operacio.

La Strategia Plano aludas al pli specifaj subplanoj por unuopaj fakoj. Ĝuste tian subplanon urĝas krei, en kiu enkadriĝu la agadoj *instruado*, *servoj* kaj *reklamado*. La unuaj du konsistigas potencialajn fontojn de enspezoj (instruado per vendo de kursoj kaj libroj, servoj per turismo, kongresoj, eldonado ktp). Iliaj profitoj estu kontrakte transdonitaj al la reklama sekcio, kiu havu la taskon krei (varbi) la klientojn laŭ plej valoraj kaj sukcesaj vojoj.

Helpo al la landaj asocioj

UEA nun apenaŭ reklamas: ĝi vivas kiel servodonanto, perante nian kulturon. Krom el la kotizoj de ĝiaj membroj, necesas ĉerpi el aliaj rimedoj por subteni tiun agadon, ekzemple por pagi la salajrojn de la Centra Oficejo. Kaj apenaŭ ekzistas landa asocio aganta sur pli komerca bazo. La enspezoj pro instruado kaj vendado de varoj kutime iras al la staĝejoj kaj la eldonistoj. La lernolibroj ne vendiĝas je komerce realisma prezo, kiu ebligus reinveston. Konvenan maklerajon malofte ricevas niaj verkistoj. Kaj la landa asocio restas sola en sia laboro veki intereson ĉe la publiko.

Male kiel la landaj asocioj, UEA havas internacian statuson kaj strukturon, kaj pli da rimedoj ol iu ajn alia en Esperantujo. Necesas ke ĝia Estraro akceptu sian komercan respondecon kaj trovu bazon por financi la reklaman sekcion. UEA devas nun voki al spertuloj pri ekonomio, financo, komerco, reklamo, ĝi serĉu la sperton kie ĝi estas. Oni atentu kvar ĉefajn kriteriojn: la ekonomian, por difini nian merkaton; la financan, por diversigi niajn monfontojn; la komercan, por adapti la varon al la publiko; kaj la reklaman, por mesaĝi sukcese al la elektitaj celoj.

Samtempe ni ne forgesu la dediĉitajn argumentistojn de la movado, kies argumentoj nun trovos oportunan uzon, la bonvolan instruistaron, kiu ĝis nun faris pene kaj izolite la plimulton de la reklamado. Eble per moderna reklamplano UEA sukcesos multobligi la informpetojn kaj tiel helpi ĉiujn asociojn. Nur tio donos ŝancon, ke Esperanto ĝisvivu sian duan jarcentan jubileon.

Jean-Louis Texier (Francio)

75-a Universala Kongreso:

Bonegaj kontaktoj kun la kuba socio

La Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Nikola Raŝić, flugis al Kubo en novembro 1989 por trakti la kongresajn preparojn. Jen rakonto pri liaj spertoj, kiu jam donas ian guston pri la tria evolulanda UK en dek jaroj.

Post dusemajna vizito al Havano mi certe ne povas pretendi koni kaj kompreni Kubon (kaj Latinamerikon des malpli). Sed konfirmon de la popularа stereotipo pri *mañana* ("morgaŭ") mi ne trovis ĉe niaj LKK-anoj. Jam ekde la unua mateno, kiam mia korpo insistis pri la horo por tagmanĝo, oni komencis plenforte. La plano de la vizito estis jam ŝtopita, sed tamen ni devis aldoni plurajn pliajn kunsidojn kaj taskojn. La rezulto ignoris ĉiujn sindikatajn rajtojn je okhora labortago kaj semajnfina ferio.

Ni komencis per kunsido de LKK en la ejoj de la fremdlingva eldonejo "José Martí", kiu malavare subtenas la kongreson per ĉiuj disponeblaj rimedoj: fenomeno facile klarigebla, se oni ekkonas la simpatian kaj temperamentan direktoron Felix Sautié, unu el la plej gravaj subtenantoj de Esperanto en la verda insulo. La ĝenerala sekretario de LKK, Alberto Calienes, estas dungito de la eldonejo, kun plena libereco okupiĝi pri la UK.

Ĉiu kongreso kaj ĉiu LKK estas io nova kaj neantaŭvidebla. En tio kuŝas la ĉarmo de ĉiu kongreso, sed ankaŭ la riskoj. Tamen jam la unua kunsido helpis malpliigi kelkajn zorgojn. Kvankam temas pri movado kun apenaŭ dekjara organizita historio, ne eblis rimarki tion en la laboro de LKK. Iliaj ideoj pri la kongreso estas tute klaraj kaj tre konkretaj. La vizitojn de diversaj LKK-anoj, al la UK-oj en Varsovio, Roterdamo, Brajtono, la IJK en Kerkrade kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj, oni detale analizis por dedukti la instruojn. La organizo de la internacia aranĝo "Esperanto '88" kaj la nacia kongreso estis kvazaŭ ĝeneralaj provoj por la granda evento. Estas same danĝere laŭdi LKK ok monatojn antaŭ la kongreso, kiel estas nekonsilinde profeti kiel ĝi funkcios. Tamen mia ĉefa kialo por esperi pri sukceso estas ne nur la juna, entuziasma kaj kompetenta LKK, sed ĝuste la granda homa kapitalo malantaŭ ĝi: amaso da agemaj helpantoj, kiuj devos trapasi detalajn seminariojn por prepari sin al la dumkongresa funkciado. La elekto de la helpantoj kaj ilia trejnado estas ĉi-momente la plej granda tasko de LKK. Krom tio ankaŭ la turisma entrepreno Cubatur mendis seminarion kaj lingvokurson por siaj homoj kiuj priservos la kongreson.

Malfermita al la ekstera mondo

La ĉefa ambicio de LKK estas fari la kongreson nestereotipa. Tradukite, tio signifas fari la kongreson kubeca... kaj ne nur tio: La amerika kaj latinamerika konceptoj tre gravas. Oni klopodas

AL HAVANO PER RADIO!

La Esperanto-redakcio de Radio Havano anoncas konkurson, kies ĉefa premio konsistas el senpaga vojaĝo kaj restado en Havano dum la kongresaj tagoj. La konkurson kunaŭspicias UEA kaj la Kuba Ministerio pri Kulturo.

Simple verku respondon al la demando: Viaopinie, kiun gravecon havos por la Esperanto-komunumo okazigi la 75-an Universalan Kongreson en Kubo?

La respondo estu minimume dupaĝa aŭ 50-linia, maksimume kvinpaĝa, kaj klare verkita. Krom la plej bona, ankaŭ la ceteraj dek plej bonaj respondoj ricevos premion. Sendu por alveni antaŭ la 30-a de aprilo 1990, al Konkurso "75-a UK en Havano", Radio Havano, Poŝtfako 7026, Havano, Kubo.



Sorĉe bela naturo atendas la kongresanojn en la subtropika insulo. Lokoj kiel la parko Jaruko, proksime de Havano, proponas mirindajn panoramojn kaj buntajn plantaron kaj birdaron.

aranĝi la programon tiel, ke ĝi respegulu la realon de la "okcidenta hemisfero" plurfacete. Oni sentos tion tra la arta programo, tra la programeroj pri la kongresa temo, tra distraj programeroj kaj alimaniere. Alia karakteriza trajto de la 75-a UK estos multaj eksteraj kontaktoj. Oni aranĝas modernan kaj ambician funkciadon de la gazetara servo, kiu priservos plurajn kubajn kaj eksterlandajn ĵurnalistojn, movadajn ĵurnalistojn kaj la internaciajn novaĵagentejojn, al kiuj oni havos rektan aliron per modernaj komunikiloj.

En la trakto de la kongresa temo partoprenos pluraj nemovadaj gastoj, kiuj kontribuos per apartaj prelegoj kaj simile. Oni ankaŭ planas multajn eksterkongresejajn renkontiĝojn. Intereson renkonti siajn kongresontajn kolegojn ĝis nun esprimis organizoj de kubaj virinoj, verkistoj, medicinistoj, lingvistoj, ekumenistoj kaj kelkaj aliaj. Radio Havano Kubo deziras gastigi la movadajn ĵurnalistojn kaj aŭskultantojn de ĝiaj elsendoj, Universitato de Havano tre interesiĝas pri IKU ktp ktp. Oni planas ankaŭ interesan sportan programon. Je nia dispono estos sportaj terenoj apude de la kongresejo, kaj oni organizos simbolan maratonon kiun eble partoprenos unu el la plej famaj kubaj atletikistoj. Ni ne diros al vi ankoraŭ pri kiu temas, provu diveni mem... Estos ankaŭ aliaj amuzaj kromaranĝoj, kiel ekzemple ekspozicio de purrasaj hundoj (ĉirkaŭ ducent specoj).

En la Kuba Ekumena Konsilio ni renkontis grandan intereson pri nia kongreso. Oni disponigis al ni belan metodistan templon en la urbocentro de Havano por la dimanĉa diservo.

Perfektaj kondiĉoj por infanoj kaj aliaj

Mi vizitis interalie la sidejon de la 26-a Infana Kongreseto, la junpioniran urbon "José Martí". Tiu iama riĉula kvartalo, nun transformita en ripozejon kaj amuzejon de kubaj infanoj, havas ĉion kion la infanoj povus deziri: komfortajn loĝejojn, belan strandon, lageton kun diversspecaj boatoj, amuzparkon kun diversaj ludaparatoj, teatron, muzeon kaj amason da aliaj taŭgaĵoj. Oni aranĝos ekskurson al la zoologia kaj botanika ĝardenoj kaj al aliaj vidindaĵoj de Havano, kaj kompreneble viziton de la gepatroj al la IK-ejo, fine de la kongreso.

Mia programo inkluzivis ankaŭ viziton al preskaŭ ĉiuj hoteloj kie loĝos la kongresanoj. Hoteloj en la Orientaj Strandoj estas iom for, sed la rava ĉirkaŭaĵo kaj la proksimeco de la plaĝo povas allogi naĝemulojn. La ĉambroj en "Habana Libre" kaj "Kapri" estas je la nivelo de siaj prezoj, t.e. nenio tre luksa, sed la centra situo en la urbo kaj riĉaj eksterĉambraj servoj estas ilia plej grava avantaĝo. "Riviera" kaj "Presidente" apenaŭ meritas kritikojn, kiel ankaŭ "Tritón", kiu estas la plej proksima al la kongresejo. Ĉiuj ĉi hoteloj havas ankaŭ naĝejojn. La studenta loĝejo "Machurucutu" estas ankaŭ proksime al la kongresejo kaj posedas kontentigan komforton. "Vedado", en kiu mi loĝis, troviĝas en la urbocentro kaj estas tute plaĉa kaj intima hotelo.

Mi ankaŭ sukcesis viziti la faman strandon Varadero, kun ties ravaj sunaj sablejoj, kaj la kabaredon "Tropikana" (en pluva vespero, bedaŭrinde), celojn de niaj ekskursoj. Certe rekomendindaj.

En la oficejo de la flugkompanio Cubana, nia oficiala transportisto, oni prezentis al ni la grandajn kongresajn gluafiŝojn, kiujn portos ĉiuj aviadiloj de Cubana en internaciaj flugoj, ekde la Zamenhofa tago ĝis la kongreso. Bedaŭrinde la ankoraŭa manko de la somera horaro prokrastas la eldonon de la Dua Bulteno, kiu atendas tiujn informojn por foriri al la presejo. Sed tio tre baldaŭ solviĝos.

Pri la kongresejo sufiĉas diri ke ĝi estas unu el la plej belaj kaj komfortaj kiujn ni havis. Ĝi posedas ĉion, kion moderna kongresejo devas posedi, kaj eĉ pli. Vi vidos mem!

Mi certe ne volas malkovri al vi ĉiujn sekretojn kaj surprizojn kiujn oni preparas por vi en Havano. Prefere trovu vian aliĝilon (se vi ne jam faris tion) kaj sendu ĝin por certigi vian partoprenon.

Nikola Raŝić

Recenzoj



Sorĉa bildigo de la juna ardo

La granda Meaulnes. Alain Fournier (1886-1914). El la franca trad. Roger Bernard. Antaŭparolo de G. Waringhien. Rotterdam/La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eldono/preso). 223p. 21cm. Belliteratura serio n-ro 32. 30,00 gld.

Malgraŭ respekto al la korifeo, mi ne povas min reteni de riproĉeto al k-do Waringhien pro lia prefaco. En ties fino li petas legi la libron sen "kutimaj kriterioj de psikologia verŝajneco aŭ priskriba ekzakteco. Ĝin oni devas legi forgesante ĉian kritikemon" (p. 12). Nu, rilate min – ĉiun libron de Stafeto mi legas kun akrigita kritikemo, ĉar estas belliteratura serio, kiel asertas la eldonisto. Do, ankaŭ ĉi libron (n-ron 32) mi komencis legi kun suspekto, jam dezirante trovi psikologian neverŝajnecon. Mi volis trovi, sed... ne trovis. Spite al la konsilo de la aŭtoro de *Lingvo kaj vivo*, mi legis la romanon ne forgesante mian aĝon kaj mian vivosperton. Kaj estante nek infano nek poeto mi tamen estis kaptita de la belega prozo de A. Fournier, kiu skulptis el fragmentoj de l' infanaĝo la figuron de la pasinteco.

Komence la epizodoj ŝajnas simili protokolon, tiom detale la aŭtoro priskribas ĉiutagaĵojn de la infanoj, sed baldaŭ ĉi impreso cedas al sento de kunskulptado. La figuro de l' pasinteco iĝas preskaŭ palpebla. Paradokse, ĝi ne estas morta monumento, sed viva kaj potenca. Fine de la libro, eta epizodo okultrafe montras tiun potencon. Iamaj, ne tre amikaj infanoj fariĝas ne tre amikaj viroj, sed ili kune kaj kutime fiŝkaptas. Trista epizodo, ĉar la tempopaso ne donis intiman amikon, kaj poezia epizodo, ĉar ĝi montras eternan sopiron al la amiko vera.

Aparte belas priskribo de la "ĉevalaj" infanludoj. Eble nur ŝajnas tiel al mi, ĉar ankaŭ mi ludis siatempe la saman ludon kaj spertis renkonton kun rivalo; sed legante mi nur miris la senriproĉan priskribon de l' infana impulseco, de tiu "luda realo". En la lasta kristaliĝas ĉiuj ideoj pri tiu ĉi mondo, pri la daŭra vivo. Ankaŭ la amo. En la libro mankas la amo mem. Ĝi nur de ekstere modlas la karakterojn de la roluloj. Ili estas nur viktimoj de la ideo pri la amo.

Bona bubo ardas fari komplezon. Memstare, sen ajna permeso, li prenis ĉevalon kaj implikiĝis en aventuron. La romantika bubo frontas efektivan, kvankam bizaretan, realon. Plu ne jam estas la aventuro. Li kondutas malsaĝe, sed sen idiotaj blagoj de malbona literaturo. Renkontinte sian Beatrica li travivas intuan, kaj pro tio des pli embarasan kaj ŝokan supozon, ke la amo povas gvidi lin. Kruele kaj senkompate gvidi. Rezulte – vera karambolo. Post la karambolo sekvas pripensado kaj provo kompreni. La vivo jam iras sian vojon, ĝi ne haltas. Nur la sorĉa povo de la aŭtoro "frostigas" por ni grandan pecon de tiu vivo.

Mi kredas, ke Fournier skribis ĉi romanon ne por ke iu ajn povu kompari sian vivon kaj eltiri moralan resumon, sed pro la beleco de iu ajn vivo. Por ke ni simple vidu.

Viktor Sapoĵnikov (Rusio)

Donkiĥota malprudento

Rande de l' prudento. Miroslav Krleĵa. El la kroatserba tradukis Zlatko Tiŝljar. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1987. 240p. 22cm. Bind. Prezo: 20,10 gld.

Miroslav Krleĵa (1893-1981), membro de du naciaj akademioj, poeto, prozisto, dramaturgo, eseisto kaj publicisto, estis homo ĉiel individuisma, ne konformisma, propra kaj unika, iaspeca terurinfano, donkiĥoto, utopiisto kaj polemikulo de la jugoslavia literaturo. Kaj tia estas eĉ la heroo de lia romano *Rande de l' prudento*, de tiu romano, kiu same bone, ja eĉ pli trafe, povus porti la titolon "Rande de l' **mal**prudento". Ĉar la ĉefrolulo, mezaĝa jurdoktoro en alta pozicio, subite, ŝajne sen ia ajn logika kialo, dum solena vespermanĝo publike senmaskigas sian ĉefon, la moralan ruinulon ĝeneralan direktoron Domaĉinski, kaj ekde tiam nereteneble sobiras pereen.

La romano verkitas tre vivece. Ĝia stilo estas lerta, flua, bunta kaj eleganta, ja iam eĉ tre riĉa kaj tro multbabila, kun longaj politikaj, filozofiaj kaj sociologiaj rezonoj, kiujn tamen deale (*deale*: ripetiĝeme, kiel en *de* temp' *al* tempo ktp) minacas danĝero fariĝi tedaj, kiel ekzemple tiuj 61 linioj sur p. 162-163, kiuj fakte nur reripetas du-tri ĉiam samajn frazojn.

En la serbokroata originalo, plie, svarmas pluraj fremdaj vortoj, germanaj, francaj, latinaj. Pri ili la tradukinto bedaŭrinde ne sciis konsili al si. Tielnomataj solvoj kiel "ribelantoj atendantaj popolajn portefeuillojn" (157), "metteurojn" (143), "mi aŭskultas Verpflegungsoffizierstellvertreteron" (146), "en tiu forvercado kaj en tiuj dopelrajenhalbreĥcoj" (169), ne estas solvoj, sed ordinaraj lingvistikaj monstroj. Kial ne lasi la originalajn formojn *Verpflegungsoffizierstellvertreter*, *Doppelreihenhalbrechts*, *vorwärts*, kaj aliajn?

Kelkfoje tamen fremdlingvaj elementoj restas netuŝitaj, sed iliaj tradukoj estas fuŝitaj. La latina *si vis bellum* ne estas "la forto de milito" (145), sed "se vi volas militon", kaj ĝi estas aludo al la konata *si vis pacem, para bellum*. Same ĵurnalisto en "breechesoj" (146) ne estas en "breĉoj" (france?), sed en "rajdpantalono" (angle: *breeches*). Tiaj eraroj kelkloke ĝenas.

Miskomprenige impresas eĉ la "domposedanta remaĉado", kiu estu "domposedantoa", "domposedantula", aŭ simple nur "remaĉado de domposedanto". Aliflanke, tamen, en la teksto troveblas eĉ tiaj literaturaj minigemoj kiel "ekstere leko, interne feko" (169) kaj aliaj.

Sed, eĉ malgraŭe, *Rande de l' prudento* estas grava pliriĉigo de la traduka literaturo Esperanta. Ĝi estas streĉa. Ĝi legiĝas flue kaj facile. Kaj sendiskute ĝi apartenos al la bonnivela parto de la ĉi-speca produktado. Tiom pli, ke la kritikoj fakte eĉ ne koncernas la Esperantan tekston mem, sed nur ĝiajn fremdajn, francajn, anglajn, germanajn kaj latinajn klingoklangojn kaj ornamojn.

Karolo Piĉ (Ĉeĥoslovakio)

Kuraĝa scenigo de koŝmara realo

Obsedita de l' suno (1970). István Gáll (1931-1981). El la hungara trad. Vilmos Benczik. Budapest: HEA, 1986. 184p. 21cm. 16,50 gld.

La legontoj trovos en la romano de István Gáll tre interesan hungaran universon, kie per vojaĝo eliranta el koŝmaroj de la menso la aŭtoro kondukas al koŝmara realo de faŝismo, de kulto al la personeco, de absurdaj diskriminacio kaj subpremado politikaj. La verka principo en la romano sidas sur ĉi tio: esplori vivajn, realajn personojn por eltrovi la kaŝitajn kialojn de ties konduto, kialojn troviĝantajn ekstere en la socio. La kuraĝo kaj la honesto de la bildo liverita kongruas kun ĉi tiu epoko de *glasnost*, kvankam admirinde la verko gajnis hungaran premion jam en 1970. Speciale allogas la personeco de la ĉefrolulino, kiu preskaŭ materiiĝas antaŭ niaj okuloj tra viglaj scenoj kaj freŝaj dialogoj.

Oni eksentas, ke la tradukisto V. Benczik, kiu estas sufiĉe bone konata kiel hungara kultura ambasadoro en Esperantujo, respektegas la lingvon de la originalo, ĉar li uzadas multe da afiksoj – tro laŭ Kabea stilo – oferante tiamaniere la simplon pro la fidelo. La samon oni konstatas pri la iom abundaj kunmetoj. Profunda studo de la traduko permesas al oni supozi kelkan spiteman obsedeton en la tradukisto. Li amasigas mal-vortojn kaj ĝenerale li timas ripeti neniel. Li ne anstataŭigas "mal" laŭeble per "sen" aŭ "ne" aŭ "mis", nek mildigas la amasigon, ekzemple, anstataŭigante "malgranda" per "eta". Kaj tamen, nekonsekvence, en la traduko aperas en malgranda kvanto, eble nur simbole, "eta", "pita", "frida", "dura", ktp, pli ofte en sensignifaj lokoj. La titolo mem apogas la tezon pri spitemo. Kial "obsedita"? Laŭ PV kaj PIV tiu verbo devas ricevi kutime la participan finaĵon "-ata". (Plue, la rekta traduko de la originala titolo estas "La sunadoranto".) La tradukisto kompreneble rajtas apliki siajn proprajn ideojn; mi nur riproĉas la *etan nekonsekvencon* kaj la *neeksplikon* de la spitemo.

Ĉiuokaze, Benczik devis alfronti malfacilegan taskon, kaj li sukcesis fari bonnivelan tradukon per lingvo preciza kaj viglaj dialogoj. Certaj scenoj estas genie ĉarmaj tiel aŭtore kiel traduke. En la romano aperas etaj poeziaĵoj kaj vorto-ludado ofte impresaj kaj kompreneblaj. Ses paĝoj da notoj adekvate klarigas la uzitajn hungarismojn.

Arnoldo Aguila (Kubo)

Naiveco, klasikeco: provoj je kapto el la franca

Ĵana d'Arko ĉe la ŝtiparo, Paul Claudel, kaj **La mortinta reĝino,** Henri de Montherlant. El la franca trad. André Cherpillod. Nanterre: la tradukinto, 1986. Po 140p. 21cm. ISBN 2 906134 02 3 kaj 2 906134 01 5. Prezoj: po 21,00 gld.

Paul Claudel (1868-1955) oni ŝatas aŭ malŝategas. Mezepokulo misvaginta en la dudekan jarcenton, li almenaŭ perfekte taŭgis por verki oratorion pri Ĵana de Arko. Cetere li estis aŭtenta poeto. Lia teksto havas la naivecon de popola rakonto kaj tiun de teologio, pro kio ĝi taŭgas por tia mezepoka "ludo".

Ĵana de Arko? Ŝi estas franca nacia heroino eĉ eksterlande fama. Sed kia verdire estis ŝia rolo? Ŝi estis tia homo, kiu tiel memfide kredas je si mem – t.e. pri sia historia "misio" – ke ŝi fine trudas al aliaj kredi mem. Sed ĉu ŝi vere ŝanĝis la vivon de la kamparanoj, kiuj ŝvitas super sia plugilo, sub la angla regado? Ĉu ili malpli penis poste sub la franca? Oni ja scias, ke la parizaj burĝoj (sub angla reĝo) bone prosperis kaj ne tre ŝatis la "Virgulinon de Orleano", kiu perturbis ilian pacon. Sed oni povas nur konjekti, kia estus la historio se Ĵana de Arko restus ĉe siaj ŝafoj.

Ĉi tiu traduko prezentis kuriozan malfacilaĵon: respeguli la pseŭdo-simplecon de la originalo kaj krome esti ludebla-kantebla laŭ la muziko de Arthur Honegger. André Cherpillod sufiĉe bone elturniĝis el tio, kaj la dulingva teksto ebligas tion kontroli. Kompreneble la oftaj elizioj (pro la kantebleco) foje aspektas strangaj: tio ne estas la kutima parolata Esperanto. Sed aliflanke la piednotoj, zorge tradukitaj – aŭ eĉ aldonitaj – ebligas kompreni la (netradukitajn) latinaĵojn kaj ankaŭ la vortludojn, sur kiuj baziĝas la tuta filozofio de Claudel. Krome Cherpillod, tre fiera pri sia tiel perfektigita komputilo, plurfoje donas al ni la etimologion de vorto eĉ en la greka, la hebrea kaj la araba!

Tute alia estis Henri de Montherlant (1895-1972), verkisto de la grando, de la noblo, de la altaj sentoj. Jam pli ol sepdekjara li sentis, ke li iĝos blinda kaj kaduka: li tiam pafis al si kuglon en la buŝon. Tio estis Montherlant.

Krome li majstris la klasikan francan lingvon kaj facilplume verkis en ĝi. Tiu

Eleganta sovaĝo

Resonoj/Nachklänge. Hubert Weinzierl (1935-). El la germana trad. Eckhard Bick. Munkeno: Natur und Umwelt, 1985 (neindikita). 63p. Kolorfotoj de H. kaj B. Weinzierl. 21x19cm. Bind. Prezo: 27,00 gld.

La poeto Hubert Weinzierl estas gravulo en la germana naturprotekta movado, kaj en tiu ĉi vere elegante kaj agrable produktita poemaro ĝuste la naturprotektado – aŭ, pli precize, ĝia neprotektado – estas lia temo. Sur la dekstraj paĝoj troviĝas belaj kolorfotoj de la naturo, de bestoj kaj floroj; kontraŭpaĝe troviĝas la poemoj en la germana kaj Esperanto.

Sian ununuran temon Weinzierl traktas tre varie kaj nemonotone. Aparte trafa estas la longeta poemo "La eraro", en kiu "La Lasta Juĝo estas tute alia"; homoj kaj bestoj troviĝas en renversitaj roloj:

Oni vidis ŝtatoficistojn
kaj dommastrinojn
kaŭri en mallarĝaj kaĝoj.

En "La sorĉistino-procesio" frapa metaforo sentigas la homan mal-ŝparemon:

...ĉiujare muta rest':
juna milo de betuloj
sklavas en Kristkorpofest'.

En pluraj lokoj la poeto sovaĝe malkaŝas la hipokritecon de respondecaj ministroj kaj aliaj burokratoj. La libro certe plaĉos al multaj.

La traduklingvo estas flua kaj glata (malgraŭ "ĉirkaŭplantumi la nukleenergian centralon" por *das Kernkraftwerk eingrünen*), kaj kelkfoje tre interese utiligas latentojn de Esperanto: *ata far'* (= faro farata); *omas* (= kvantas); *avaĝis* (= aĝis ave). Al mi plaĉis, cetere, la lerta vortludo sur p. 31.

William Auld (Skotlando)

lingvo el la 17-a, 18-a jarcentoj ne estas sufiĉe malproksima por ŝajni arkaika, sed tamen sufiĉe aĝa por impresi kiel fiera nobelo, kiu rifuzas la trivialon de la hodiaŭ. Nu! sed kiel traduki tion?

La temo de *La mortinta reĝino* estas simpla. Feranto, reĝo de Portugalio, volas edzigi sian filon, Don Pedro, al la Infantino de Galicio, pro politika oportuneco. Sed Don Pedro, nek regema nek reĝema, jam sekrete edziĝis kun Doña Ines de Castro, nobelino kaj... bastardino. En la manoj de Montherlant tiu konflikto inter politiko kaj homaj sentoj iĝas dramo je la nivelo de klasika tragedio.

En la tradukado kuŝis kaptilo: ĉar la Esperanta vorttrezoro tre – tro! – similas la francan, estis relative facile per la helpo de la t.n. neologismoj (mi preferus "beletraj vortoj") preskaŭ atingi laŭvortecon. Sed ĉu tiu laŭvorteco vere tradukas la francan tekston? Mi ĉi tie ne kvereletos pri kelkaj malglataĵoj (nek pri la uzo de la ne-PIVa "hati", kiun mi mem uzis antaŭ dek jaroj en la traduko de *La justuloj* de Camus!). Temas pri la ĝenerala etoso. La originalo estas, kiel jam dirite, "altstila" same per la vortelekto kiel per la frazkonstruoj. Mi esperas, ke la nefranclingvanoj retrovos tion en la traduko de Cherpillod. Sed mi, komparante kun la originalo, opinias, ke mi aŭdas ĉion unu tonon pli malalta, ke la frazoj en Esperanto foje aspektas pezaj, dum france ne. Kaj jen ree la kerna demando: ĉu preferi la laŭvortecon, ĉu la "belajn malfidelajn"? Mi ne aŭdacas respondi.

G. Lagrange (Francio)

Facila grimpado al altaj pintoj

Fokuso. Kvaronjara popular-scienca revuo. Red. András Lukács. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio. Jaro: 1988 (numeroj 5-8). Abonprezo 1990: 24,00 gld.

Antaŭnelonge aperis la lasta numero de la jarkolekto por 1988, kun redaktora sciigo, ke en la sekva jaro (do la ĵusa, 1989) tute ne aperos ĉi tiu revuo. Tiu decido, same kiel la ega malfruo, ŝuldiĝas al la okupiĝo de la eldona kolektivo pri eluzo de ŝanĝiĝoj en la hungara lerneja sistemo por profitigi la landan movadon. Bedaŭrinde, oni ŝajne ne sukcesis trovi aliajn homojn, kiuj povus transpreni taskojn en la eldonado de *Fokuso*.

Jen sciigo ne tre kuraĝiga por eventualaj abonantoj. Mi tamen volas sproni al subteno de ĉi tiu revuo, la plej sukcesa popularscienca periodaĵo ĝis nun aperinta en Esperanto.

En *Fokuso*-n oni enprenis du antaŭajn periodaĵojn, *La mevo*-n (pri mediprotektado) kaj *Internacia*-n *komputado*-n. Tio kompreneble influas la enhavon. Sed, kvankam la du menciitaj kampoj ricevas sufiĉe da pritrakto, ne forestas aliaj sciencaj branĉoj. Ekzemploj estas sociologia artikolo pri la vilaĝo-"sistemigo" en Rumanio (n-ro 8), kaj ekonomia pri la "japana miraklo" (n-ro 5).

La artikoloj kiujn mi legis estas en lingvaĵo, kiu ne prezentas kap-rompojn. Mi ne ĉiam tuj sukcesis kapti la sencon de tekstero, sed tiukaze temis ja pri fako eĉ ne parenca al la mia. Ĝenerale mi povis bone sekvi la artikolojn; oni ankaŭ ne uzis tro specialismajn vortojn aŭ nekutiman frazkonstruon. En la 5-a numero oni provizis la legantojn per glosaro. Ĉu oni opiniis nenecesa similan enmeton en la sekvaj numeroj?

Eta redakta ĝenaĵo estas la uzo de tri punktoj anstataŭ la vorto "ĝis". Estas uzo al kiu oni rapide alkutimiĝas, aparte en tabeloj aŭ grafikaĵoj, sed mi tamen preferas en normala teksto la simplan vorton.

La tekstoj estas ne nur bone kompreneblaj. Evidente, en periodaĵo kiu celas esti popularscienca oni ne atendu la pintojn de la nuna esplorado; sed la pintoj de *Fokuso* estas, miaopinie, relative altaj. Ekzemploj estas la jam menciita artikolo pri vilaĝo-"sistemigo" en Rumanio, kiu bone bildigas (eĉ al natursciencul) kio tie estas okazanta, kaj la artikolo "Ĉu survoje al biokomputilo?" (n-ro 5), kiu koncize kaj klare informas pri antaŭvidata nova generacio de komputiloj. Ankaŭ la aspekto estas varia. Nur la kovrilaj ilustraĵoj estas koloraj, sed la nigrapresaj diagramoj kaj tabeloj, plektitaj en la tekstojn, sufiĉas. Iom pli da koloro estus tamen foje bonvena, ekzemple ĉe la artikolo pri "seka-guto-spektro" en numero 5. La legadon krome agrabligas la karikaturoj, kiujn oni disĵetas tra la numeroj. Ili rilatas al la enhavo de la koncerna artikolo kaj venas el diversaj (do, orientaj kaj okcidentaj) fontoj.

Al la revua politiko de la redakcio apartenas ankaŭ la t.n. "informaj komunikoj de la entreprenoj". Mi devas konfesi, ke mi ankoraŭ ne legis ilin, ĉar mi konsideras ilin kiel (klerigajn) anoncojn; la revuo supozeble per tio enspezas monon, sed mi iom demandas min, ĉu oni destinu ĝis 25 paĝojn el 76 (n-ro 5) al "reklamo". Tiu numero estas ja iom pli dika ol la aliaj, sed ĉu valoras la penon?

Lasta malgranda afero, kiu iom min ĝenis: La diferenco en la alteco de la numeroj estas ĝis pli ol unu centimetro, kaj tion ne necesigas la formato de la teksto.

Sed ĝenerale, do, periodaĵo kiu ja meritas abonon; por homoj kiuj interesiĝas pri komputado aŭ mediprotektado, ĝi ĉiam liveras ion interesan, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj interesiĝas pri scienco ĝenerale, *Fokuso* prezentas bonan eblecon pliigi siajn konojn. Krome ĝi kompreneble estas utila informilo pri tio, kion oni jam atingas per Esperanto. Espereble la abonantaro (r)estos sufiĉe granda por ke ĝi daŭre vivu kaj prosperu.

Rob Keetlaer (Nederlando)

Tipa informadika ŝerco el la paĝoj de FOKUSO.

Laste aperis...



Finna vojo, La (1980). El la finna trad. Osmo Buller. Hyvinkää: Mendoservo, 1989. 109p. 19cm. Politika testamento de la prezidento de Finnlando inter 1956 kaj 1982, kiu priskribas la esencon de la postmilita ekstera politiko de Finnlando: mallonge "paco, amikeco, kunlaboro". 24,30 gld.

Insulo de revoj. Manjo Austin. Pizo: Edistudio, 1989. 92p. 21cm. ISBN 88-7036-038-X. Senpretende distra romaneto pri am-travivaĵo de brita edzino en Italio. 27,00 gld.

Jura terminaro. Ĉerpita el PIV. R.E.C. Thom. Coatbridge: Kardo, 1989. 45p. 21cm. Anglalingvaj ekvivalentoj por milo da Esperanta vortoj. 3,90 gld.

Kantareto. Ĉeĥoslovakaj popolaj kantoj esperantigitaj (1929). El la ĉeĥa trad. Jan Filip kaj Karel Filip. Praha/Břenov: František Buhr, 1948 (2-a pliigita eld.). 59p. 20cm. Kun muziknotoj. 3,00 gld.

Kompleta lernolibro de regula Esperanto. Komplementa volumo. Ludoviko Mimoo Espinalto. Red. Analiza Skolo. Paderborno: Esperanto-Centro Paderborno, 1989. 163p. ISBN 3-922570-55-0. 21cm. Kompilaĵo de tiuj partoj de la logikisma gramatika studaro *Esperanto por la jaroj du mil*, kiuj ne aperas en la pli frua verko *Kompleta lernolibro de regula Esperanto.* 24,60 gld.

Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj. Komp. Rikardo Ŝulco, Hermano Bermano. Paderborno: Esperanto-Centro Paderborno, 1989. 141p. ISBN 3-922570-60-7. 21cm. Ŝlosilo al plene esperantigitaj formoj de pli ol 10 000 geografiaj, personaj kaj aliaj nomoj, kun koncizaj etimologiaj kaj kategoriaj indikoj. 24,60 gld.

Materiiĝoj en Mantes (1925). J. Thiébault. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1989 (2-a eld.). 39p. 21cm. Pri la enkorpiĝo de spiritoj dum mediumaj kunsidoj en franca urbeto. 5,70 gld.

Mi esperas amon. El poezio de la nealiancaj landoj. Div. aŭtoroj, elektis kaj plejparte tradukis Borisa Miličević. Novi Sad-Beograd: Esperanto Societo "Marko Nešić"/Serbia Esperanto-Ligo, 1989. 52p. 20cm. "31 patriotismaj kaj amlirikaj poemoj de 26 poetoj el 18 nealiancaj landoj", precipe el Afriko kaj Azio. 8,40 gld.

Ora girlando de poezivesperoj de Struga. Div. aŭtoroj, trad. B. Miličević k.a., red. Usni Zemoski. Ohrid: Makedonia Esperanto-Ligo, 1989. 35p. 24cm. 24 poemoj de 24 poetoj, gajnintaj unuan premion en la jaraj internaciaj poeziaj festivaloj de Struga. 6,60 gld.

Paradigmoŝanĝo en la sciencoj. Prelego pri parapsikologio, homo kaj scienco, Heinz C. Berendt (1937-). El la germana trad. Jeremi Giŝron (ne indikita). Jerusalem: Sivron, 1989. 20p. 15cm. 5,40 gld.

Pipi Ŝtrumpolonga. Astrid Lindgren. El la sveda trad. Sven Alexandersson. Motala: Progreso, 1989. 174p. 21cm. ISBN 91-87320-06-1. Verŝajne la plej legata libro de la mondkonata aŭtoro. Geknaboj Tomi kaj Anjo travivas multajn aventurojn kun eksterordinara knabineto. 36,30 gld.



Post la inundo. Nguyen Manh Tuan, Thanh Que. El la vjetnama trad. Thuy Minh Ngoc. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1988. 118p. 16cm. Kolekto Hibisko. Tri noveloj pri moderna Vjetnamio. 3,00 gld.

Psikosocia problemaro de internacia turismo/Psychospoleczna problematyka turystyki międzynarodowej. Tyburcjusz Tyblewski. San Marino: AIS, 1988. 177p. ISBN 83-85033-05-X. 20cm. Ilus. Studo pri la deziroj kaj spertoj de internaciaj turistoj, inkluzive de la esperantistoj. 16,00 gld.

Regno de Dio, La. Div. aŭtoroj, red. Philippe Cousson. Poitiers: Evangeliaj Kajeroj 5, 1989. 76p. ISSN 0984 7626. 21cm. Diverstendenca artikolaro. 13,20 gld.

Sprachentwicklung und Neologismen im Esperanto. Gangolf Nitsch. Wien: Pro Esperanto, 1989. 28p. 29cm. Ringe bindita. Lingvistika studo. 17,40 gld.

Tibor Sekelj, pioniro de la dua jarcento. Biografia eseo. Spomenka Štimec. Wien: Pro Esperanto, 1989. 20p. 21cm. Intima skizo pri la aŭtoro kaj mondvojaĝanto, verkita baldaŭ post lia morto en septembro 1988. 6,90 gld.

Tra l' silento (1912). Edmond Privat (1889-1962). Postparoleto de E. Borsboom. Vieno/Budapest: Pro Esperanto/HEA, 1989 (5a eld.). 40p. ISBN 963 571 292 8. 20cm. Lirika, intima poemaro, heroldo de la unua matura periodo de la originala poezio. 7,80 gld.

Unueco en diverseco. La unusola vero en la skriboj de ĉiuj religioj. Komp. O.P. Ghai. El la angla trad. Heinz Dieter Maas. Rosenheim: Horizonte, 1989. 67p. ISBN 3 926116 70 6. 22cm. Kompilaĵo sub 29 kapvortoj de mallongaj instruoj el la hindua, zoroastra, tao-a, budha, kristana, konfucea, ĝaina, juda, islama, ŝintoa, sika kaj bahaa kredoj, montranta similecon inter ili. 27,30 gld.

Velký slovník česko-esperantský (1949). Jan Filip kaj Karel Filip. Praha: Slovakia Esperanto-Asocio, 1989 (represo de la 2-a eld.). 352+302p. ISBN 80-900387-1-9. 21cm. Du-voluma. 18,90 gld.

Velký slovník esperantsko-český (1949). Jan Filip kaj Karel Filip. Praha: Slovakia Esperanto-Asocio, 1987 (represo de la 2-a eld.). 256+188p. 21cm. Du-voluma. 12,00 gld.

Vere aŭ fantazie. Rakontaro en facila Esperanto. Claude Piron. Chapecó: Fonto, 1989. 216p. 21cm. Rakontoj el diversaj partoj de la mondo, zorge verkitaj kaj aranĝitaj por laŭgrade vastigi la vortprovizon de la leganto (komence taksitan je nur 405 morfemoj). 21,60 gld.

Versaĵoj. Libro Unua (1912). Georgo Deŝkin (1891-1967). Postparoleto de Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1989 (represo). 32p. 21cm. Frua adoleskula poemaro, romantika kaj sincera. 7,20 gld.

Vivoplena grundo, La. Vivo el la patrino Tero. Henigo Erhardo. El la germana trad. Klieno Kristofo Joaĥimo. Paderborno: Esperanto-Centro Paderborno, 1988. 31p. ISBN 3-922570-52-6. 21cm. Priskribo de la grundekologio kaj ĝia signifo por la homoj. 9,90 gld.

Weltsprachenfrage im wissenschaftlichen Werk Hugo Schuchardts, Die. Hermann M. Ölberg. Wien: Pro Esperanto, 1989. 15p. 21cm. 6,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Loke



• **Hispanio:** La 17-an de decembro oni inaŭguris impone altan monumenton je Zamenhof en la urbo Sabadell. Aperis ankaŭ luksa E-prospekto pri la urbo. Kontaktu la Urbanan Komisionon, Canonge Joncar, 122-lletra D, E-08208 Sabadell.

• **Argentino:** La 30-an de novembro 1989 strato en Mar del Plata ricevis la nomon "Esperanto", post kvarjara kampanjo de loka Esperanto-asocio sub la prezido de Clara Pagani de Motta.

• **Bulgario:** De la 1-a ĝis la 3-a de decembro Bulgara Esperantista Asocio festis en Sofio la centjariĝon de la Esperanto-movado en sia lando. Bulgara E-Teatro prezentis la originalan teatraĵon *Lanĉo* de Emilija Lapenna; okazis prelegoj pri diversaj aspektoj de la movado; kaj BEA ricevis la plej altan ordenon de Bulgario. Aperis ampleksa ĵurnalformata informilo en la bulgara lingvo. En laborkunsidoj la asocio decidis i.a. pri la fondo de firmao "Presperanto" por administri la eldonan, perantan kaj librokomercan agadon de BEA.

En oktobro okazis en Vraca seminario pri "Internaciismo en la Esperanto-literaturo". Partoprenis sesdeko da homoj el sep landoj, inkluzive de prelegantoj Julian Modest, István Ertl kaj Nikola Aleksiev.

• **Francio:** Malgraŭ regula informado al movada kaj nemovada publiko, Unuiĝo Franca por Esperanto sukcesis allogi nur centon da spektantoj al la Sesa Kultur-Festivalo en Parizo. La muzika kaj literatura partoj estis sukcesaj, la teatra komplete forestis post lastmomenta malkonfirmo de la Krakova kaj Zagreba trupoj. UFE nun frontas la demandon, ĉu daŭre investi monon simple por vivteni tiun kulturan aranĝon.

La tria plej granda ĵurnalo en norda Francio, *Nord Matin*, ekhavis semajnan, duonpaĝan E-rubrikon. Prizorgas ĝin kaj petas ĉiuspecajn informojn Dimitri, 19 rue St Eloi, F-59000 Lille.

• **Italio:** La 16-an de decembro, gelernantoj de la elementa lernejo "Le Villette" en Massa festis la 130-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, disdonante florojn al la loĝantoj de la strato Via Esperanto.

• **Kubo:** Bulgara E-instruisto Marin Bacev alvenis en Kubo fine de 1989 por organizi dum ses monatoj E-kurson en la landinterno. La celo estas doni pli da parolekzercado al tiuj esperantistoj, kiuj loĝas for de la ĉefaj centroj de E-agado. En la havana lernejo Ludoviko Zamenhof oni ekuzas la E-lecionojn por instrui la lernantojn ankaŭ pri aliaj temoj.

• **Malto:** Ekde aprilo 1990 la malta radio dissendos 13-partan informprogramon pri la lingva problemo kaj Esperanto, sub la prizorgo de d-ro Carmel Mallia. Somere sekvos radio-kurso.

• **Niĝerio:** La niĝeria planlingvo Guosa (*Esperanto* 1988/p.58) provizore ne solvas la lingvoproblemojn de la lando, laŭ raporto el pasinta marto en la niĝeria semajngazeto *Newswatch*. En tiu lando de ĉ. 400 etnaj lingvoj, la angla funkcias kiel nacia liglingvo sed estas sentata kiel esence fremda, dum la plej grandaj etnaj lingvoj haŭsa, joruba kaj igba estas parolataj – kune – de malpli ol duono de la loĝantaro. Angla piĝino disvastiĝas sed ankoraŭ malhavas prestiĝon. Guosa, la kreaĵo de Alex Igbineweka, kunigas elementojn el dudeko da indiĝenaj lingvoj; laŭ nia scio, ĝi ankoraŭ ne akiris parolantaron.

• **Turkio:** Muzaffer Ekerbiĉer fondis Internacian Kulturan Servon en sia naskiĝurbo Kirŝehir, kadre de kiu li organizas E-kursojn kaj kontaktojn. En 1990 li esperas vastigi la agadon ĝis la duoninsulo Datĉa. Kontaktu lin ĉe Ankara Cad. No. 24, Kirsĉehir.

• **Ukrainio:** Okaze de la 175-a datreveno de la naskiĝo de Taras H. Ŝevĉenko, renoma ukraina poeto kaj pentristo, la eldonejo "Naukova dumka" aperigis libron de 150 tradukoj de unu lia poemo, "Testamento". Krom Esperanta traduko fare de Nadija Andrianova-Hordijenko, kvar nacilingvaj tradukoj – en la irlanda, gaela, kimra kaj malta – estas faritaj per uzo de Esperanto kiel pontlingvo.

• **Usono:** Esperanto-Ligo por Norda Ameriko konfirmis sian meriton por la Trofeo Fyne 1989 per 20%-a kresko en sia membraro dum la pasinta jaro. La individua membraro de UEA en Usono montris eĉ pli ol 40%-an kreskon. Ankaŭ en aliaj fakoj senteblas la efika funkciado de la Centra Oficejo de ELNA sub direktoro Mark Stephens: interalie vendiĝis en unu jaro pli ol 2000 ekzempleroj de nova inform- kaj kurslibro.



• **Venezuelo:** Esperanto-monumento en Maracaibo estis inaŭgurita fine de aŭgusto, en ĉeesto de la urbestro, gazetaro, televido kaj radio. Foton kontraŭ 6 irk sendas David G. Valecillos, Calle 79, n-ro 3C-72, Maracaibo 4002.

En la prestiĝa lingvista revuo *Boletín de linguistica* prof. Jorge C. Mosonyi aperigis detalan artikolon pri la atingoj kaj perspektivoj de Esperanto kiel internacia lingvo.

Fake



• **Filatelo:** La poŝta administracio de Unuiĝintaj Nacioj alvokis por la propono de taŭgaj temoj dum la jaroj 1991-1995. La temoj devas esti universalaj aŭ internaciaj, kaj montri la laboron de UN. Skribu, prefere en unu el la oficialaj lingvoj de UN, al PO Box 5900, Grand Central Station, New York, NY 10163, Usono.

• **Muziko:** Muzika E-Ligo anoncas konkurson por vidbendoj, fotoj kaj kasedoj, kiuj prezentas la Internacian E-Ĥoron kadre de Universala Kongreso inter 1980 kaj nun. Unua premio: senpaga gastado en Pisanica, Bulgario, dum la jubilea festo de la Ĥoro, 20-30 junio 1990. Konkursaĵojn ricevas Dimitâr Terziev, ul. Milin Kamâk 58, BG-1421 Sofia.

• **Nealiancaj landoj:** Internacia Kultura Servo lanĉis la poemaron *Mi esperas amon*, kolekton de poezio el 18 nealiancaj landoj, kadre de dutaga kolokvo pri nealiancaj landoj la 17-an kaj 18-an de novembro en Zagrebo. Partoprenis i.a. ambasadoro A. Demajo, ĵurnalisto F. Svetić kaj d-ro J. Jelić, kiu reliefigis la kontribuon de latinamerikaj aŭtoroj. Inter tiuj, la kuba poeto kaj infanverkisto José Martí nun legeblas en Esperanto per kelkaj bildlibroj.

• **Prospektoj:** Atingis la Centran Oficejon lastatempe novaj koloraj prospektoj pri Suda Koreio (petu ĉe Korea E-Junularo, Pk. 4258, Seulo) kaj Ĉeĥoslovakio (petu ĉe ČEDOK, Esperanto-Centro, Na Příkopè 18, CS-11135 Praha 1).

E-traduko de prospekto pri la franca urbeto Cubjac (Périgord) mendeblas de la Urbodomo, F-24640 Cubjac. Informa E-vidbendo pri la norvega urbo Hamar estas pruntepreneblа kontraŭ sendokostoj de Per Johan Krogstie, Karudveien 1, N-2340 Løten, aŭ aĉetebla kontraŭ NOK 375,–.

• **Servas:** En la anglalingva internacia bulteno de ĉi tiu monda reto de gastigantoj aperis diskuto pri la uzo de Esperanto, aŭguste 1988 kaj printempe 1989. Dum eŭropanoj ĝenerale favoris la uzon de pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto, la japana sekcio pledis por daŭrigo de la angla – agnoskante ke ĝi kaŭzas malfacilaĵojn, sed preferante unu fremdan lingvon super pluraj.

• **Stomatologio:** Balázs Szemök, Hungario, defendis en novembro sian doktoran disertacion pri "La evoluo de la hungara stomatologia lingvo kaj evoluigo de Esperanto".

• **Terminologio:** En *Sovetia esperantisto* n-ro 3-4 troviĝas interesa superrigardo pri la nuntempa terminologia agado en Esperanto. Rimarkinda novaĵo estas la raporto pri la sovetia terminologia sekcio. Prilaborataj estas vortar(et)oj i.a. pri fiziko, ekologio, poligrafio, heraldiko, matematiko, konstruo-arkitekturo, kemio, medicino, botaniko, parazitologio... La sekcion estras V. Gakalenko, ab/ja 137, Tiĥvin-6, SU-187500 Leningr. obl.

• **Tradukado:** Tri membroj de la Esperanta Literatura Traduk-metiejo en Havano, Kubo (vd. *Esperanto* 1989/p.132-133) referis pri Esperanto kadre de la 1-a Simpozio pri Literatura Tradukado komence de novembro. Arnoldo Aguila gajnis unu el la kvin premioj aljuĝitaj inter la deksep referaĵoj, kaj la ĵurio da la 1-a Traduka Konkurso "Juan Marinello" rekomendis eldoni lian tradukon de *Kumeŭaŭa* de Tibor Sekelj.

• **Turismo:** La pola entrepreno Esperantotur raportas grandan kreskon en la veturado inter Pollando kaj Sovetunio, dank' al la pliboniĝo de vojaĝkondiĉoj. Dum 1989 ĉ. 70 busoj de Esperantotur vizitis Ukrainion, 50 Litovion, dum 130 trairis Sovetunion survoje al Finnlando aŭ Turkio. Kun la firmao kunlaboras Leningrada E-Centro, Kooperativo "Kompaso" (Litovio) kaj Lviva E-Centro (Ukrainio), kiu organizis la 5-an Internacian Simpozion pri Esperanto kaj Turismo fine de septembro 1989.

• **Urboĝemeloj:** Seatla E-Societo (Usono) lastatempe lanĉis serĉon por esperantistaj partneroj en la ĝemelaj urboj de Seatlo: Mazatlán, Meksikio; Mombasa, Kenjo; Limbe, Kamerunio; Chongqing, Ĉinio. Ĉu okazas io pri E-kontaktoj inter aliaj urboparoj en la mondo? Sendu informon foje al la revuo...

• **Verkistoj:** Post forpaso de sia prezidanto Tibor Sekelj kaj demisio de sekretario Ada Csiszar, Esperantlingva Verkista Asocio reelektis sian estraron. Eniris Aldo de'Giorgi (provizora prezidanto), Marjorie Boulton (vicprezidanto), Alec Venture (kasisto), kaj krome Spomenka Štimec, Tyburcjusz Tyblewski, George Lagrange kaj Gerrit Berveling. La posteno de sekretario provizore vakas. Komisiitoj estas Michel Duc Goninaz (klasikaĵoj) kaj Reto Rossetti (revizio de manuskriptoj). En 1990 pluvalidas la propono de Edistudio eldoni la plej bonan proponitan manuskripton: sendu al Aldo de'Giorgi, Via M. Anzi 19, I-22100 Como, Italio.

BIBLIOGRAFIO DE PLANLINGVAJ PERIODAĴOJ

Triopo de d-ro Árpád Máthé, s-ro Luis Mª Hernandez Yzal kaj s-ino Ana Molera-Urgellés, kiel anoj de **Rondo TAKÁCS** dum du jaroj kolektis informojn pri pli ol 6000 diversaj planlingvaj periodaĵoj.

Por kompletigi la bibliografion, kies 95%-oj rilatas al Esperanto, ni bezonas helpon de diverslandaj kaj diversfakaj samideanoj, kiuj aŭ informos nin pri la periodaĵoj, kiujn ni ne havas aŭ ĝis nun ne vidis, aŭ sendos al ni la necesajn revu-numerojn.

Helpemuloj bv. kontakti aŭ s-ron Hernandez Yzal (Str. Dr. Zamenhof 12, E-08739 San Pau d'Ordal, Hispanio), aŭ d-ron Árpád Máthé (Tusnádi u. 14., H-1125 Budapest, Hungario).

Persone

• **Junier:** Raran distingon ricevis en novembro 1989 Géo Junier, la kuratoro de la Nacia E-Muzeo en Gray, Francio. En ĉeesto de la departementa prefekto kaj aliaj eminentuloj, oni honorigis lin per la "Ora Stelo kronita de la Franca Akademio", rekone al lia kultura agado.

• **Lapenna:** Per la financa subteno de multaj individuoj, Fondaĵo Ivo Lapenna starigis tomboŝtonon en Kopenhago honore al la granda organizanto de la postmilita movado. Sur la hela granita ŝtono tekstas: "Plenuminte siajn taskojn en la vivo Ivo Lapenna trankvile forpasis. Profundan dankon al unu el la plej noblaj kaj elstaraj homoj de la mondo – al la granda humanisto." Poste aldoniĝos reliefa portreto en bronzo, por kiu mono estas ankoraŭ serĉata: sendu al UEA-konto tomb-i aŭ al Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio (pĝk 1 19 06 01).

• **Nguyen:** Unu el la plej konataj tradukistoj el la vjetnama, Nguyen Minh Kinh, fariĝis 75-jara en aprilo 1989. La esperantistoj de Ho Chi Minh-urbo aranĝis por li solenan feston en la urba kulturdomo.

• **Wells:** La prezidanto de UEA John Wells pasigis aktivan aŭtunon. La 18-an de novembro li prelegis ĉe Japana E-Instituto en Tokio, kaj partoprenis kunvenon kun ĝiaj gvidantoj. Kvin tagojn poste li estis en Budapeŝto, kie li kunsidis kun membroj de Hungara E-Asocio. La 15-an de decembro li festprelegis en Aalen, FRG, okaze de la inaŭguro de Germana E-Biblioteko, kaj la sekvan tagon li partoprenis la Zamenhof-feston de la grupo en Stuttgart.

Kalendaro

Ni povas prezenti nur tiujn aranĝojn, pri kiuj oni informis nin! Bonvolu sendi kontribuaĵojn por la marta kalendaro 1990 antaŭ la 10-a de februaro. Ni publikigas la datojn kaj kontaktadreson de internaciaj aranĝoj kaj ankaŭ de la landaj kongresoj, ie ajn en la mondo. Ni ankaŭ bonvenigas la adresojn de turismaj firmaoj, kiuj povas garantii priservon en adekvata Esperanto.

daŭre **BET "Esperantotur"**, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Esperantoturist, str. Positano 40, BG-1000 Sofio, Bulgario; tel. (003592) 882472; telekso 23599 kabini bg.
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario
Esperanto-sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo "Express", Pk. 567, H-1395 Budapest, Hungario

februaro

05-09: **11-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso,** Campina Grande, Brazilo (CP 277, BR-58100 Campina Grande (PB)).
23-25: **Skipromenado,** Heusy (Verviers), Belgio (M. Grela, Rue de la Colline 16, B-8380 Welkenraedt)

aprilo

09-17: **Amikeca Turismo** (inkluzivas internacian kurson por komencantoj), Zagrebo, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pk. 499, YU-41000 Zagreb)
11-17: **14-a Internacia Junulara Festivalo,** San Giovanni di Valle Aurina, Bolzano, Italio (Itala E-Junularo, via Villoresi 38, I-20143 Milano; temo "ludoj")
13-15: **85-a Skota Kongreso de Esperanto,** Carberry Tower Conference Centre, apud Edinburgo (R. Calder, 92 Liberton Brae, Edinburgh, Britio EH16 6LB)
13-16: **Paska Junulara Renkontiĝo,** Vierhouten, Nederlando (Lilian v.d. Burgt, Postbus 528, NL-6200 AM Maastricht; temo "arto")
13-20: **6-a Printempa Semajno Internacia** (porfamilia aranĝo), montara vilaĝo Todtmoos, FRG (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-str. 2a, D-4418 Nordwalde)
14-17: **45-a SAT-Amikara Kongreso,** Bondy (Parizo), Francio (SAT-Amikaro, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris)
18-22: **12-a TEJO-PSEK-Seminario,** Zielona Góra, Pollando (Esperanto, Pk. 43, PL-65-958 Zielona Góra; temo "aktivula trejnado")
22-22: **SATEB-Jarkonferenco,** Barlaston, Britio (SAT en Britio, 29 Farrance Road, Romford, Essex RM6 6EB)
24-28: **Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo "La Iĝanta Mondo"**, Tours, Francio (Organiza Komitato, Pf. 0631, F-37006 Tours CEDEX; prelegoj kaj debatoj pri paco, evoluo, ekologio, demokratio)
27-04: **Esperanta Semajno pri Sano kaj Resanigo,** Lingfield, Britio (Martin Howard, Webbs Cottage, Woolpits Road, Great Saling, Braintree, Essex CM7 5DZ)



La Iĝanta Mondo
24-28aprilo
Francio

Kultura Esperanto-Festivalo
24-27 majo
Svedio



Rondo en Kebekio
1-14 julio
Kanado

majo

04-07: **74-a Brita Kongreso de Esperanto,** Oksfordo, Britio (K.M. Hall, 37 Granville Court, Oksfordo OX3 0HS)
11-24: **Amikeca Turismo** (aranĝo por pliaĝuloj; inkluzivas internacian kurson por komencantoj), Zadar, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pk. 499, YU-41000 Zagreb)
24-27: **Junulara Semajnfina Turisma Renkontiĝo,** Prago, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa E-Junularo, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1)
24-27: **3-a Kultura Esperanto-Festivalo,** Västerås, Svedio (KEF3, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stokholm; teatro, muziko, literaturo k.a.)
31-10: **Vojaĝo tra la historiaj kaj renesancaj urbetoj de Bulgario** (Esperantoturist, adreso supre)

junio

01-04: **68-a Germana Esperanto-Kongreso,** Freiburg, FR Germanio (Konrad Gramelspacher, Rimsinger Str. 13, D-7812 Bad Krozingen 4)
02-08: **42-a IFEF-Kongreso,** Hamar, Norvegio (Karudveien 1, N-2340 Løten)
18-06: **Somera Kursaro,** Ŝtata Universitato de Sanfrancisko, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010)
20-30: **Internacia Muzika Semajno** (inkl. Jubilea Festo de la Internacia Esperanto-Ĥoro), Pisanica, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
28-03: **42-a Nacia Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio,** Ŝumen, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre)
29-06: **Internacia Esperanto-Semajno,** Nico, Francio (Groupe espérantiste de Nice, "Les Hortensias 2", 121B Bvd. Napoléon III, F-06200 Nice)

julio

iam en julio: **Renkontiĝo de Montŝatantoj,** Moskvo/Kaŭkazio, Sovetunio (detalojn petu antaŭ 1 aprilo de E-klubo "Edelvejso", ul. 2-Siniĉkina 19, SU-111020 Moskvo)
01-14: **Rondo en Kebekio, Kanado** (E-Societo Kebekia, Pk. 126, Succ. Beaubien, Montréal, QC. H2G 3C8; busa kaj bicikla veturoj)
07-17: **2-a Junulara Esperanto-Renkontiĝo en Alpoj-Adrio,** Zadar, Jugoslavio (Kroatia E-Ligo, Amruševa 5, YU-41000 Zagrebo; temo "ekologio")
11-16: **50-a Hispana Esperanto-Kongreso,** Sant Cugat del Vallès, Katalunio (Grupo de Esperanto "Jozefo Anglès", Apartado 336, E-08190 Sant Cugat del Vallès)
14-20: **11-a Internacia Somera Esperanto-Universitato,** Veliko Târnovo, Bulgario (Esperantoturist, adreso supre; ĉeftemo "Veliko Târnovo kaj la E-movado kadre de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo")
14-21: **75-a Universala Kongreso de Esperanto,** Havano, Kubo (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
16-23: **40-a KELI-Kongreso,** Neuchâtel, Svislando (Kristana E-ista Ligo Internacia, E. van Dijk-Kuypers, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando)
21-28: **46-a Internacia Junulara Kongreso,** Playa Giron, Kubo (46-a IJK, Pk. 2018, C-10200 La Habana 2)
29-05: **58-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj,** Sarajevo, Jugoslavio (58-a IKBE, ul. D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo; brajlaj leteroj al Zeljko Bajić, ul. Akifa Šeremeta 11, YU-71000 Sarajevo; temo "Specifeco kaj problemoj komunikaj de la vidhandikapuloj")

S-ro Lawrence Mee havas novan adreson: 1 Maple Leaf Gardens (Cranbury Court), Eastleigh, Britio SO5 5GY.

S-ino F. Van der Horst (Kamer 1019, Boezemsingel 100, NL-3034 CA Rotterdam bedaŭras anonci, ke ŝi ne plu povas korespondi pro malbona vidkapablo.

Neĝo, nebulo, frosto. Ĉie estas la imperio de Paĉjo Frosto, Kien fuĝis *Baldur*, la dio de la printempo? Li regas inter floroj en Cassis. Venu trovi la varmon en sudfranca Esperantujo (Jarlibro 1989, p. 210).

Martin Haase havas novan adreson: Zülpicher Wall 30, D-5000 Köln 1, FR Germanio. Tel. (0221) 41 99 36.

Mi volas interŝanĝi kasedojn de folklora aŭ moderna muziko el ĉiuj landoj. Pekim Vaz, Caixa Postal 3250, BR-69001 Manaus (AM), Brazilo.

Por varbado skribi al: S-ino Bichler, Pf. 16, D-8120 Weilheim i. OB, FR Germanio.

Tarifo: *Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.*

Anoncetoj

Por la unua fojo vi povas aŭskulti plenan Esperantan teatraĵon sur kasedoj – la briļan prezenton dum la Brajtona kongreso de *Kiel amas la aliuloj*, komedio de la fama brita verkisto Alan Ayckbourn, tradukita de William Auld. Du sonbendoj kun klarigaj notoj: GBP 7,90 (12 ekuoj) inkl. sendkostojn. Mendu nun, pagu poste al: La Esperantaj Servoj de Ivor Hueting, c/o 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britio.

15-jara lernanto dez. kor. pri libroj, biologio, historio, radio, lingvoj; kolektas bk, pm, pk. Resp. garantiata. Nikolao Bogdanov, Poste Restante, SU-252004 Kiev 4, Sovetunio.

41-jara programistino deziras korespondi tutmonde: Nikolinka Nikolova Angelova, str. Buzluĝanski Kongres 8 vh. B pk. 21, BG-5000 Veliko Târnovo, Bulgario.

Frans van Dooren, aŭtoro konata sub la pseŭdonimoj F. V. Dorno kaj Deck Dorval, transloĝiĝis al jena adreso: Bautersemstraat 49, Flat A-11, B-2550 Kontich, Belgio.

Ĉu vi povas helpi nian junan movadon en Togolando, sendante al ni diapozitivojn per kiuj ni povas montri al la publiko la tutmondan uzadon de Esperanto? Kun granda danko atendas viajn reagojn: Gbeglo Koffi, B.P. 13.169, Lomé, Togo.

Zamenhoftage aperis nova revuo en Esperanto kaj la hispana. Abonojn al *Internacia lingvo*, kun anekdotoj, novaĵoj, pedagogia sekcio, historio, peras Esperanto-Fondaĵo "Fernando Soler", Duque de Calabria 4, 2a, E-46005 Valencia, Hispanio.

Claude Piron
La bona lingvo
112 p. 14,10 gld.

Vi ne povos diskuti pri Esperanto, se vi ne konas tiun verkon, kiu sensacie klare montras la superecon de la Zamenhofa lingvo.

Edmond Privat ***Tra l' silento*** 28 p. 7,80 gld.

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe:
PRO ESPERANTO, Postfach 28, A-1014 Wien, Aŭstrio.

LINGVO KAJ VIVO
DE GASTON WARINGHIEN

"Mi ĉiam relegas [la] enhavoriĉan ***Lingvo kaj vivo,*** *ĉiufoje trovante novajn profundajn ideojn kaj plej subtilajn analizojn."*
AKADEMIANO E. BOKAROV

Dua, korektita eldono: Jubilea Kolekto n-ro 3. 450p.
Bindita. 48,00 gld. plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekz.

Nobelpremio pri literaturo 1989:

Camilo José Cela

La familio de Pascual Duarte

el la hispana tradukis Fernando de Diego

Ĝuu en Esperanto unu el la ĉefverkoj de la moderna mondliteraturo: aŭdacan kaj krudan bildigon de la primitiva kampara socio, en 1942 frapintan Hispanion kiel fulmo el nigra ĉielo. La intensa penetremo kaj homkompreno de la aŭtoro vekis vastan admiron.

Eldonis Barcelona Esperanto-Centro, 1985. 166p.
Ilustris Joan Carles Magria. UEA-prezo: 18,00 gld.

Jen ĝi estas – la longe atendita libro:

MEMORLIBRO GRAZ 1987

LA INTERNACIA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO

CENT JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

Ampleksa raporto pri la plej grava kultura evento en 1987, enhavanta:
1. la lastajn paroladojn de Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj de D-ro Paul Neergaard;
2. superrigardon de la 100-jaraj kulturaj atingoj. Lekciistoj: Albault, Régulo Pérez, Gacond, Marjorie Boulton, Ragnarsson, Neergaard, de Zilah, Mayer, Thierry, Zelazny, Lapenna;
3. rezoluciojn, fotoreportaĵon ktp.

Eldonita de "FONDAĴO IVO LAPENNA", redaktita de D-ro Klaus Perko, Aŭstrio.
Formato A5, broŝurita, 170-paĝa, verdkolora, glita kovrilo. Prezo: 175 d.kr. inkl. afranko.

Mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (50,70 gld.) aŭ rekte ĉe "FONDAĴO IVO LAPENNA",
kasisto: Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk.: København 1190601.

Fonto

Por sensoifigi
ĉiun literaturamanton:

poemoj
rakontoj
eseoj
antikvaj kaj novaj,
originalaj kaj tradukitaj,
simplaj kaj profundaj.

Tra 10 jaroj *Fonto* akvumas nian beletran kampon. Ĉerpu vi el ĝi!

Abonu pere de UEA (30 gld.)
aŭ rekte ĉe la eldonisto (US$15):
Gersi Alfredo Bays
Caixa Postal 49, BR-89800 Chapecó-SC, Brazilo

Ĉu foje logas vin:
- *fremdaj mondoj?*
- *estontaj epokoj?*
- *aliaj civilizacioj?*
- *la limoj de la universo?*

Ĉion ĉi vi trovos, el la plumo de aŭtoroj mondfamaj kaj obskuraj, movadaj kaj nemovadaj, el deko da landoj, en:

Sferoj 2, 3, 4, 5, 6

Po 18,00 gld. de la Libroservo de UEA.

HEROLDO
DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 69 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 19,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA
(43 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italio

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska